

1987 novembro
80a jaro
n-ro 983 (11)


aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando

Cent jarojn
mesaĝtabulo
por la mondo



Vi trovos,

emfazon ĉi-numere pri flanko de Esperanto, kiun ni ofte preteratentas en nia serĉado de novaĵoj, de intelektaj argumentoj, de oficiala rekono. Temas pri tiu spirita, solidariga rolo de la Internacia Lingvo, kiun emfazis prof. Waringhien en la julia-aŭgusta numero. Ja unu el la celoj de UEA dum ĝia preskaŭ 80-jara ekzisto estas ĝuste "kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidaro". En niaj unuaj paĝoj vi trovos rakontojn hom-proksimajn, unikajn sed samtempe reprezentajn pri centoj kaj miloj da similaj spertoj. Pri tio ni lasas la parolon al James Lieberman, sur paĝoj 192-193. Ĝojigan paĝfoliumadon!

Enhavo

- 189 Internacia jaro de la senhejmuloj: Senhejmaj milionoj
- 190 Personaj spertoj: Tra milito, al amo per Esperanto (Erik Johansson); Esperanto helpis min retrovi perditan amikon (Zheng Bocheng); Per(u)sona paŝado al Esperanto (E. James Lieberman); "Esperantistoj esperigas esperantojn" (Jacques Tuinder)
- 194 Lingvistiko: Esperanto iĝis serioza temo (Detlev Blanke); Paŝoj en nova strategio (E. Symoens)
Hector Hodler (1887-1920)
- 195 Junularo: Por franca-germana amikeco (Thomas Pusch); Trans la sovetiaj limoj (László Szilvási)
- 196 Teknika estrarkunsido: Nova direktoro por la Centra Oficejo
- 197 Nekrologoj: István Szerdahelyi; Cyril John Adcock
- 198 Diskuttemo — Movada strategio: Nur per unudirekta strebado (Kolo-mano Kovacs); Malsamaj signifoj de Esperanto (Ĵila S. Saheb-Zamani)
- 200 Kulturo: Epokofara paŝo en la Esperanta filmkulturo?
Tukpinĉiloj (Karolina Gilmore)
- 201 Recenzoj: *Kuba ŝtata organizo* de Domingo García/trad. Kuba Esperanto-Asocio (Werner Bormann); *Homo* de Eduardas Mieželaitis/trad. Petras Čeliaskas (William Auld); *Stilekzercoj* de Raymond Queneau/trad. István Ertl (Georgo Kamaĉo); *Ventolume* de Debora Vaarandi/trad. H. Dresen, S. Kärner, J. Ojalo (Ŝibajama Ĵun'ići)
- 203 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 205 Kongresa komuniko de la 73a Universala Kongreso en Roterdamo
- 206 Loke—Fake—Persone (mallongaj novaĵoj)
- 208 Nekrologoj; Anoncetoj

La kovrilo

La mesaĝtabulo en Varsovio — iom ĥaosa, kiel memoros multaj kongresanoj! — kvazaŭ resumas tiun riversimilan kongresan vivon, kiu fluas kaj kirliĝas ĉirkaŭ la programaj rokoj. Ni restas ĉe la opinio septembre esprimita, ke estas ĝuste tiu neregebla, sen-diga inundo de interhomaj kontaktoj, kiu sukcesigas niajn kongresojn — kaj kiu tenas Esperanton vivanta kaj kreskanta post ĝia centa jaro. Konsideru ĉi tiun numeron iuspeca modesta festo honore al tiu mesaĝtabulo, kaj al la reto de internacia amikeco, kiun ĝi simbolas.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperantomovado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744; telekso (5) 9103500242 ud.

Vicprezidanto (Gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35

Vicprezidanto (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Jap.; tel. (3) 770 64 86; telekso 02655177 eki j.

Ĝenerala sekretario (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Fr.; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (financoj): s-ro Gian Carlo Fighiera, Juan Ramón Jiménez 28, 6ª A, E-28036 Madrid, Hispanio; tel. 250 39 87; telekso 42188 omt e.

Estrarano (ekstera agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.; tel. (1) 316 423; telekso 225931 muegy h.

Estrarano (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Estrarano (gvidas internan agadon): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Nia unua artikolo ĉi-numere estas plia ero en serio, kiu jam de 30 jaroj celas ligi la Esperanto-komunumon kun la laboro de UN kaj ĝiaj organoj. Eĉ rilate al temoj, pri kiuj UEA mem havas nenion por diri, la Asocio ja povas celadi konsciigi kaj diskutigi sian membraron pri ili. Jen ekzemplo: la Internacia Jaro de la Senhejmuloj. Fakte la malriĉo ja rilatas la aferon de Esperanto, ĉar oni ne atendu ke homoj zorgos pri internacia kompreniĝo, kiam mankas al ili plej bazaj vivrimedoj. Sed pli vaste, la malriĉo apelacias rekte al tiu sento de homa solidareco, kiun UEA, en la tradicio de Zamenhof kaj Hoder, provas disvastigi. Ni esperas, ke vi trovos ĉi tiun artikolon leginda kaj pensinstiga — eventuale eĉ alirevue represinda!

Kio pri la rolo de Esperanto en la solvo de ĉi tiaj problemoj? La agado de UEA necese limiĝas je la antaŭenigo de la diskuto kaj la proponado de Esperanto kiel taŭga internacia diskutilo. Sed tio ne signifas, ke aliloke en la Movado oni ne povas efike agi pri ili. Jacques Tuinder, sur p.193, provizas inspiran ekzemplon en la kampo de okulkuracado: kie do estas niaj Agadoj E3 por malsatantoj, por rifuĝintoj, por analfabetoj... por senhejmuloj? En modesta sed unike vasta kadro, ni esperantistoj povus kontribui al la klopodoj por solvo de la urĝaj mondaj problemoj. Eĉ per informado kaj diskutado ni farus tion. Ĉar komunikado ne estas pasiva afero: ĝi postulas engaĝiĝon, aktivan sindediĉon, elspezon de tempo kaj energio. Ĉu niajn fortojn ni povus pli ofte kaj trafe direkti al tiuj celoj?

Senhejmaj milionoj

La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj deklaris la jaron 1987 la Internacia Jaro de Ŝirmo de la Senhejmuloj. Pli ol miliardo da homoj — kvarono de la monda enloĝantaro — estas aŭ plene senhejmaj aŭ loĝantaj en ekstreme malbonaj loĝejoj kaj ne higienaj ĉirkaŭaĵoj. Ĉirkaŭ cent milionoj estas komplete sen ŝirmo; ili dormas en la stratoj, sub pontoj, en neokupitaj parceloj, en pordejoj.

La problemo de neadekvataj loĝejoj estas universala. Ĝi estas komuna al industria kaj evoluantaj landoj, al urbaj kaj kamparaj regionoj. Pro senprecedenca vastiĝo de la urboj, la evoluantaj landoj frontas timigan taskon liveri ŝirmon, servojn kaj laboron en urboj por 150 000 pliaj personoj ĉiutage.

En la kabanaroj la urbaj malriĉuloj vivas en senhelpa nesekureco, kie ili estas ripete elpelataj el hejmoj, kiujn oni malkonstruas antaŭ iliaj okuloj, kaj frontataj de malamikaj oficialuloj, kiuj rifuzas rekoni ilian ekziston. Malamikeco bredas malamikecon. En tiuj kiel fungoj kreskantaj kolonioj de nelegaj okupantoj, generacio de urbanoj elkreskas sen iu ajn investo en la nuna socia ordo, kiun ili trovas seninterrompe subprema. Multaj el ili kulpigas la socion pro sia maldigna vivo; multaj ankaŭ lernis vivi per atakoj kontraŭ ĝi.

Multaj el la elektitaj kuracmetodoj fortigis la malsanon. Ekzemple, se instancoj rimarkas, ke la kvalito de la loĝejoj en la urboj estas malbona kaj vivkondiĉoj estas ne higienaj, la solvo, kiun ili ofte aplikas, estas altigi la normojn por loĝejoj per pli strikta policumado de pli rigoraj konstrureguloj.


Tamen, pli altaj normoj altigas ankaŭ la koston de konstruado kaj metas laŭlegajn loĝejojn eĉ pli foren de la povo de la urbaj malriĉuloj. Rezulte, pli kaj pli ili estas puŝataj en kabanarojn kaj mezurbajn kvartalaĉojn. La instancoj konstatas, ke estas tro multaj nelegaj loĝantoj, malplenigas iliajn koloniojn kaj forbatas ĝis la tero iliajn domaciojn.

Plej multaj registaroj klopodis reloĝigi nelegulojn en loĝejojn konstruitajn de la ŝtato. Ankaŭ tio ne solvis la problemon. Ne nur temas pri tio, ke la rapideco de publi-

ka konstruado grave postrestis la grandigon de la urboj, sed ankaŭ ke eĉ tiaj ŝtate konstruitaj loĝejoj montriĝis multe tro kostaj al la malriĉuloj. Sekve la instancoj estis devigataj subvencii la malriĉulojn kaj ili rapide konstatis, ke la kosto estas multe tro alta. Tiu kompleta malsukceso ofte igis ilin eviti la problemon de liverado de ŝirmo per ŝajnigo, ke tiu problemo ne plu ekzistas.

Febra urba grandigo kaj kreskanta postulado de loĝigo superpuŝas lupagojn al niveloj multe pli altaj ol estas pageblaj por la malriĉuloj kaj eĉ por grandaj grupoj de anoj de la meza klaso. La instancoj respondas per devigaj lupaglimigoj — solvo, kiu igas investon en loĝejoj neekonomia kaj sekigas la fluon de novaj loĝejoj unuoj, tiel, ke fortiĝas la premo ĉe ekzistantaj unuoj kaj rapidiĝas la kresko de nelegaj kolonioj.

Plejparte, la obstakloj al la liverado de ŝirmo estas home fari- taj, kun radikoj en leĝoj kaj ekonomiaj kondiĉoj. Por forigi tiujn barilojn oni devas, unue, garantii



Fotoj: Michael Kahn kaj Rashid Talukder/Unesko.



al urbaj malriĉuloj sekuran rajtigon al terparceloj, kiel ajn malgrandaj ili estas; due, permesi al ili konstrui iun ajn specon de loĝejoj laŭ ilia elspezkapablo kaj lasi ilin plibonigi ĝin kiam iliaj kapabloj tion permesas; trie, plenumi ilian bezonon de higieno kaj sekura trinkakvo plej malmultekoste kiel eble, kaj, fine, malfermi al ili aliron al financa kaj teknika helpo por konstrui sian hejmon.

En la serĉo de malmultekostaj alternativoj, arkitektoj kaj loĝplanistoj trovis, ke la plej bona komencovojo estas zorge ekzameni la tradician arkitekturon kaj konstrumetodojn de la koncerna lando. Tiu vojo, antaŭe sekvata nur de imagoplenaj arkitektoj, estas nun vaste uzata de loĝplanistoj kaj produktas abundajn dividendojn. Nebakitaj argilaj briloj, ekzemple, ne nur kostas konsiderinde malpli ol betonaj blokoj aŭ fajrumitaj brikoj, sed ankaŭ plibonas kiel varmizoliloj.

Dua grava leciono, kiun lernis planistoj, estas, ke, se oni povas tiri loĝigon enen de la pagkapabloj de malriĉuloj, tiam, anstataŭ bremsi la ekonomion, investo en loĝigo por malaltspezuloj povas fariĝi potenca kaj daŭra stimulo de ekonomia kresko en difinita evoluanta lando.

Se temas pri solvo de la ŝirmproblemo, la evoluantaj landoj devas mobilizi la ŝparaĵojn de la malriĉuloj por financi la konstruadon de iliaj propraj hejmoj. Ne nur oni devas enpreni privatajn konstruistojn kiel entreprenistojn por konstrui domojn por malaltspezuloj, sed oni devas orienti la konstrumaterialan industrion por plenumi la bezonon de malalkostaj konstrumaterialoj.

Tio ne celas, ke la industrio akceptu malaltajn profitojn en produktado kaj vendado de tiuj materialoj, sed ke oni provizu la industrion per la teknika apogo bezonata por produkti malalkostajn konstrumaterialojn por malalkostaj loĝejoj. Fina sed tre grava punkto estas tio, ke la sukceso kaj elteneblo de ŝirmprojektoj peze dependas de la partopreno de la celatoj.

La urba kaj kampara malriĉularo montris grandegan kapablon plibonigi siajn loĝkondiĉojn kun malmulta aŭ nenia ekstera helpo — tiel montrante la bezonon de procedoj, kiuj celas "helpi la povrulojn helpi sin mem", bezonon ĉiam pli kaj pli rekonatan de registaroj en ties politiko kaj programoj de evoluigo.

Tiun aliron al la politiko de homaj loĝlokoj pli kaj pli adoptas la registaroj de evoluantaj landoj. Tial, ekzistas espero, ke nunaj tendencoj estas inversigeblaj, ke aktualaj kondiĉoj ne estas neŝanĝeblaj kaj ke tiun grandan defion oni povas sukcese fronti. (el *Uneska kuriero*/H.T.)

RENTO JE FIKSDATAJ DEPONOJ ĈE UEA MALALTIĜAS AL 5,0%

La rento pagata pro fiksdaj deponoj (ŝparkontoj) ĉe UEA malaltiĝos de 6% al 5% ekde la 1-a de decembro 1987. La nova procentaĵo validas por ĉiuj novaj deponoj ekde tiu dato. La malnovaj deponoj ricevas ankoraŭ 6% ĝis la fino de sia deponjaro. Poste ili aŭtomate renoviĝas je la nova procentaĵo, se la deponinto ne petas antaŭe repagon.

La decidon rezultigis la lastatempaj perturboj en la internacia financa merkato. Spite la malaltiĝon, niaj multnombraj ŝparantoj certe memoros, ke havi deponon en guldenoj — unu el la tri plej stabilaj valutoj de la mondo — daŭre havas siajn avantaĝojn.

PERSONAJ SPERTOJ

Tra milito, al amo per Esperanto

En aprilo ĉi-jare ni ricevis leteron de Erik Johansson (Gotenburgo, Svedio), kiu sciigis nin pri la morto de sia edzino Johanna. En ilia geedziĝo, antaŭ pli ol 45 jaroj, Esperanto rolis "en duobla signifo" — kiel klarigu s-ro Johansson mem. Ni malmulte ŝanĝis lian tekston, por ke ĝi konservu la freŝecon de la originalo.

"Ni renkontiĝis per korespondado en Esperanto jam en 1936, kaj en 1939 mi vizitis ŝin en Roterdamo en ŝia gepatra hejmo kaj restis tie unu monaton. Ni amis unu la alian tre multe kaj ni volis geedziĝi, sed kiel vi scias la terura milito venis, la Hitlera armeo okupis Holandon la 10an de majo 1940. Sed mi skribis al la konsulejo kaj diris ke ni volas esti geedza paro, jes mi ankaŭ vizitis Svedan pastoroŭicejon kaj ili sendis paperojn kun informoj al simila oficejo en Roterdamo, ĉar mi devis havi vizon kaj pasporton por montri ilin... Post multe da skribado kaj telefonado ni gajnis.

"En printempo 1941 mi veturis al Roterdamo de la Sveda urbo Trelleborg tra Sassnitz-Lybeck-Hamburg-Bremen-Osnabrück. Dum la milito la fervoja horaro ne ekzistis ĉar transportrimedoj estis unuavice en militservo. Mi venis al Hamburg meznokte en la dua tagnokto, tie mi demandis staciestron pri la vagonarhoraro al Rotterdam. Feliĉe li parolis svedlingve, li admonis min trankvili en hotelo ĉar vagonaro kiun mi devas preni foriros je la kvara horo. Mi iris al la hotelo kaj tie ricevis ĉambron, bone mi pensis nun mi povas dormi ĉar mi estis tre laca, sed tuj post ol mi enlitiĝis venis amaso da anglaj bombmaŝinoj

Esperanto helpis min retrovi perditan amikon

Jen alia korespondaĵo, kiu antaŭnelonge alteriĝis sur nian skribotablon. Samkiel la ĉi-supra rakonto de s-ro Johansson, ĝi bele bildigas la solidarecon, kiu ofte ligas esperantistojn.

Mi eklernis Esperanton tute hazarde, tamen rapide posedis ĝin. Poste mi konstante legas esperantaĵojn kaj aktive disvastigas nian lingvon. Mi amas Esperanton ne nur pro tio, ke ĝi estas facila, neŭtrala kaj utila, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi estas lingvo de amikeco. Per Esperanto mi amikiĝas kun multaj esperantistoj, ĉinaj kaj eksterlandaj, per Esperanto mi eĉ retrovis mian amikon, kun kiu mi ĉesigis kontakton antaŭlonge.

Lernante en elementa lernejo en Ŝanhajo, mi havis bonan samklasanon nomitan Poon Kwokyeung. Ni sidis ĉe la sama tablo kaj ofte ludis kune. Ni disiĝis en la kvara klaso pro lia translokiĝo al Makao, poste al Honkongo kune kun liaj gepatroj. Mi restis en Ŝanhajo. Ni interkonsentis korespondi ĉiam. Fakte ni tion faris dum longa tempo. Post diplomiĝo el mezlernejo, mi sukcese plenumis eniran ekzamenon en la Pekinan Medicinan Kolegion, kaj

kaj mi devis salti el la lito kaj iri malsupren al la kelo, jes ŝirmĉambro: tie mi devis resti longan tempon ĉar bombmaŝinoj venis en pluraj atakoj.

"La postan tagon je la 4a horo mi denove sidis en fervoja vagono al Roterdamo. Je la Holanda limo mi denove transis vagonaron. Kiam mi eniris la vagonaron kaj ricevis lokon subite venis juna knabo kaj eksidis antaŭ min kaj rigardis min ĉar mi portis la verdan stelon sur mia jako. Mi tiam pensis, nun estas danĝere ĉar Hitler ne permesis la lingvon internacian, sed aŭskultu, li alparolis min per Esperanto, mi estis tre feliĉa. Li demandis min kien mi pensas vojaĝi kaj mi respondis lin al Rotterdam. Li tiam diris al mi ke li loĝas en Rotterdam kaj ke li volas helpi min. Mi pensis ke ŝirmanĝelo sendis lin en mian vojon, ĉar

dum la vojaĝo mi multfoje devis interŝanĝi al aliaj vagonaroj kaj plejofte estis vagonaroj de soldatoj en militservo. Mi certe scias ke sen helpo de la Roterdama esperantisto mi neniam renkontus mian Johanna, ĉar estis germanaj gardosoldatoj kiuj pafis sen alvoko pro timo ke io surprizatakas ilin. Kiam mi kaj mia nova Esperanto-amiko venis al Rotterdam estis meznokto de la tria tagnokto sen dormo... Mi kaj mia kara Jo ricevis permeson resti nur tri tagojn en Roterdamo. Nia geedziĝa ceremonio estis en la urbodomo, kaj poste ŝi fariĝis Sveda civitano... Mi neniam forgesas mian esperantistan amikon, kiu akompanis min en la urbon Roterdamo preskaŭ sen dormo en vastaj distancoj."

Erik Johansson



tiam li migris al Aŭstralio por akiri pluan edukon. Poste mi fariĝis pediatro en norda Ĉinio, kaj li dentisto en urbo Broken Hill, Aŭstralio. Ni korespondis daŭre. Kvankam politikaj movadoj en Ĉinio sinsekvis unu post alia, tamen nia komunikiĝo estis senĉesa. Sed katastrofo alvenis al la ĉina popolo. La tiel nomata granda kultura revolucio okazis. Dum la tumulto mi estis persekutita, kaj estis rabitaj miaj privataj objektoj, inkluzive de la leteroj kaj la nova adreso de mia amiko Poon Kwokyeung. La korespondado inter ni estis tiel interrompita.

Kelkaj jaroj pasis. La "Kvarpersona Bando" falis. La situacio en Ĉinio ŝanĝiĝis multe. Nia lando praktikis la malfermiĝan politikon. Mi klopodis rekontakti kun d-ro Poon per ĉiuj eblaj rimedoj, sed vane. Mi sendis leterojn al li laŭ lia malnova adreso en Honkongo, kiun mi trovis hazarde en unu el miaj malnovaj kajeroj. Neniu respondo. Mi iam skribis al la urbestro de Broken Hill por akiri helpon. Li respondis tuj, kaj informis min ke Poon jam forlasis la urbon antaŭlonge. Tiam mi perdis preskaŭ mian tutan esperon. Nur en 1986 la fajro de espero ekbrulis en mia koro: La 71a UK okazos baldaŭ, kaj eble iuj aŭstraliaj delegitoj scios pri mia amiko. Mi partoprenis la grandiozan kongreson kaj kaptis ĉiun okazon por demandi renkontitajn aŭstralianojn. Bedaŭrinde, neniun el ili konas lin. Foje mi interparolis kun f-ino Margaret Warr, aŭstralia

esperantistino, kiu laboras por la Internacia Biblio-Misio. Admirante nian profundan amikecon, ŝi esprimis sian simpatian al mi kaj volonte helpis min. Mi donis al ŝi mian vizit-karton kaj la malnovan adreson de Poon. Verdire, mi ne metis grandan esperon sur ŝin, ĉar mi sciis pri la malfacilaĵoj.

Ne longe post la UK mi veturis al alia urbo por oficeja afero. Reveninte tri semajnojn poste, mi vidis sur mia skribtablo leteron de f-ino Warr. El ĝi mi sciigis, ke tuj post sia reveno al Bentleigh, Victoria, ŝi komencis serĉi la dentiston en la telefonlibroj de multaj urboj por mi. Finfine ŝi trovis la vortojn "K.Y. Poon, dentisto" en la telefonlibro de Sidnejo, granda urbo en la ŝtato Nova Suda Kimrio, malproksime de ŝia hejmo. Ŝi informis min senprokraste. Mi prove skribis al tiu ĉi doktoro, kaj respondo venis rapide. Li estas ĝuste mia serĉita amiko. Ni denove interkomunikiĝas. Poon esprimis sian ĝojon kaj sian deziro viziti Ĉinion. Nun mi atendas, atendas lin kun pacieneco. Imagu, kian grandan dankon mi ŝuldas al f-ino Warr, la bonkora kaj fervora esperantistino.

La rakonto estas mallongigita, tamen ĝi forte pravas, ke Esperanto estas ja utila kaj esperantistoj estas entuziasmaj kaj helpemaj. De tiam mi amas nian lingvon des pli, lernas kaj dissemas ĝin fervore pli.

Zheng Bocheng

Per(u)sona paŝado al Esperanto

Kiu interesiĝus pri rakonto de mia senfina esperantistigado, ludlaboro de pasinta triono de la jubilea jarcento?

Eble vi, komencanto, kiu trovos eternan naivulon apenaŭ kaŝata sub tavolo de mia scio kaj sperto. Kaj vi, mezgradulo, ĉar ni ambaŭ kunportas miksitajn fieron kaj anksion bone konatajn al infano, metita nevole inter pli grandaj, saĝaj gefratoj kaj senvorta bebo. Fine, eĉ vi, spertulo, kiu eble trovos mian lukton amuza, utila, almenaŭ psikologie interesa por analizi psikiatron, kies paŝadon prilumis du eŭropaj geniuloj, Zamenhof kaj Freud, kaj unu de la pli granda mondo, Gandhi.

Esperanto ne estas ludo, sed sen kapablo ludi per lingvo d-ro Zamenhof ne povus krei ĝin. Necesas, por preni kaj uzi ĝin, kombini seriozecon kaj ludemon. Tia lingvoludado kondukas laŭ malfacila sed miriga vojo preter Nepur-lango al Bellangujo, tra minacaj minaĉoj kie oni trovas ŝtonan vort-ercon el kiu la silaboremaj faras trezorojn. Forfalas fuŝbuŝo, profitas poeto. La plimulto, nek klaŭnoj nek geniuloj, sekure sekvas la vojon, partoprenante krear homan aventuron.

Jen skiza kalendaro de mia irado en la Esperanto-kampo.

1901 (proksimume): La naskiĝo de mia patro, ie en rusa Pollando aŭ pola Rusujo, eble ne tro malproksime de Zamenhof. Avĉjo elmigris pro deziro malmiliti. Kial li ŝanĝis de Azrael ("helpanto de Dio") al Lieberman ("karulo") post la alveno en Usono eĉ Paĉjo, kiu estis 10-jara knabo tiam, ne sciis. Paĉjo, kiu fariĝis bona, idealista kuracisto, parolis hejme la jidan, iame la polan kaj rusan, kaj uson-angle en la nova lando.

1906: Naskiĝo de Panjo, en Milwaukee, de gepatroj el Odessa. Krom la angla ŝi parolis la jidan, en lernejo studis la germanan, francan kaj italan. Bela violonistino, ŝi vojaĝis facile helpe de tiuj lingvoj kaj la internacia muziko.

1934: Mi naskiĝis, pli ol du jarojn post la unua fratino, kvar jarojn antaŭ la lasta. La meza infano fariĝis psika plenaĵo de sandviĉo, inter du panjaĵoj. Mi ludis violonĉelon, sed parolis nur unulingve. La gepatra jida utilis nur por kaŝi aferojn for de ni infanoj.

1942-47: Komence de la dua mondmilito Paĉjo volonte aliĝis al la usona armeo — renverse de la situo de sia patro, kun bona kialo. Pro tio mi translokiĝis kvinfoje, migrante al Kalifornio finfine. Dume mi perdis amikojn pli rapide ol mi povis trovi novajn, foje sentis min izolita, avida ko-

respondadis, amis librojn, kiujn mi povis kunporti. Sume, fariĝis knabo ĉe la rando de diversaj junulaj rondoj.

1949-53: Pro filatela kaj ŝaka intereso, partoprenis internacian poŝtan turniron. Ekaŭdis pri Esperanto de iu s-ro Visanko el Finnlando, kiu povis korespondi en kvar lingvoj. Mia honto: La lerneja latina ne estus praktika eĉ se mi ĝin memorus; post du jaroj en universitato mi nur balbutis la germanan.

1954: Kiel 19-jara medicin-studento vojaĝis Eŭropon per ŝipo kaj radoj, malrapide, des pli, ke la pensoj kaj sentoj flugegis. Bicikle mi renkontis bicikliston de Jugoslavio en Parizo. Mi deziris vidi ties landon, ĵus malfermitan al usonanoj, do fenestro en la postmilita "fera kureteno". Li helpis per nomo de interpretistino en Zagreb, kiu cetere parolis la anglan. Ŝi, Vlasta Uršić, zorgema kaj impona, enkondukis min al Esperanto. La unuan okazon poste — en Svedujo! — mi aĉetis anglan instrulibron pri la Internacia Lingvo, kiun mi legis ŝpirante hejmen.

Kia bela afero! Sed, se ĝi vere estas tia, kial Esperanto ankoraŭ ne verdigis la mondon? Kio mankas al ĝi?

1957: Dum somera vizito al Eŭropo mi ĉeestis (sed ne vere partoprenis) Universalan Kongreson en Marseille. Renkontis Marjorie Boulton, aŭdis Ivo Lapenna. Esperanto vivas, fariĝas miraklo intime kaj grandskale! Poste, en Torino, promenadis kun la karmemora d-ro Giorgio Canuto, tiama prezidanto de UEA, afabla kuracisto kiu flegis min sindone dum kelkaj horoj, parolante malrapide kaj bonhumore. Dum promonado mi ekkomprenis slangon: "Mi devas maltrinki."

1959: Nova kuracisto, mi laboris unu jaron en novjorka hospitalo, ironte poste al Bostono por specialiĝo en psikiatrio. Publikigis artikolon



okaze de la zamenhofa jubileo en grava medicina gazeto. La antaŭvidita amaskurego al Esperanto ne sekvis. Naivulo! Tiel granda frustracio sekvas signifan sukceson: al frapa forto, drapa pordo nek malfermiĝas, nek eĥas.

1960-67 Laboris en la Esperanto-movado. Redaktis nacian gazeton, partoprenis kunsidojn, korespondadis, strebis prezenti la mesaĝon al porpacaj kaj sciencaj kaj studentaj organizaĵoj, ktp. Streĉo fortigas la animon, sed tro da streĉo sen ripozo aŭ ekvilibro ŝiras ĝin. Feliĉe, renkontis Humphrey Tonkin kaj Jonathan Pool ĉe la universitato de Harvard.

1968: Kun tiuj viglaj homoj starigis fonduson, Esperantic Studies Foundation, por subteni esploron pri lingvaj problemoj. Publikigis angla-lingvan bibliografion pri Esperanto de H.T. Vekis etan respondon el akademianoj.

1972-75: Prezidanto de Esperanto-Ligo de Norda Ameriko. Ankoraŭ la Esperanto-parolado ne fluis, tial mi ĉiam suferis je prelegaj okazoj. Cathy kaj Bill Schulze, Bill Harmon kaj Charles Power fariĝis kvar-cilindra motoro de la usona movado. Sed foje mi konkludis ke — krom tiaj maloftaj individuoj — la movado havas pli da malforto ol forto, ke ĝia plej peza ŝarĝo estas la movadanoj, kaj la genia lingvo pluvivas malgraŭ — ne pro — la movado. Ĉu snobismo?

1977: Ĉe la UK, Rejkjaviko, mi refoje enamiĝis Esperante. Kia plena, sprita semajno! Refoje mi strebis akiri fluecon, ellaborante paroladon pri seks-edukado por la Internacia Kongresa Universitato. Mi decidis lasi la administran flankon kaj plibonigi la lingvoscion. Mi legis pli el la literaturo: *Esprimo de la sentoj* kaj *Aventuroj de pioniro* de Privat; romanojn de Rosbach, Szathmári, Valano; poemojn de Zamenhof, Miĥalski, Boulton, Auld, Baghy, Kalocsay, Ragnarsson. La kantoj de Piron/Tzaut plenis min k/orele.

1978-83: Invitita lekciisto ĉe la Someraj Universitataj Kursoj (SUK, 1978), mi laboris malrapide super la kajero antaŭ, dum kaj post la bela, defia semajno en Liege. Renée Triolle regis stimulan programon; mia fako, psikologio, permesis al mi longan historian perspektivon — "de pia tero al terapio". Finpretigi la kajeron estis la plej malfacila laboro de mia vivo. Finfine ĝi aperis en 1983: *Seks-edukado kaj mensa sano*. Ĉu Esperanto estas facila lingvo? Ne por mi. Tamen mi povas persisti ĉe tio, kio donas tiom da plezuro. Ĝi malfermas kaj plenigas cerbon kaj kordon. Jen perspektivo: neniel ajn mi povus fari tian tekston germane, kvankam mi studis ĝin pene en universitato, uzis ĝin iomete en Eŭropo, kaj tradukis verkpecojn de la psikologo Otto Rank.

1986: Ĉinio! Esperanto plenumas la promeson. La Zamenhofa lingvo vere unuigas la mondon. Mi prelegis pri la evoluo de psikoterapio de post Sigmund Freud; ĉifoje la laboro fluis pli facile.

ESF, dank' al kontribuo de la geSchulze-oj, povis subteni kvar observantojn al Pekino, du ĵurnalistoj kaj du lingvistoj. Observi Esperanton funkciantan estas necese por konvinkiĝi pri ĝia valoro. Kompreneble, skeptikismo persistos eĉ post trempiĝo en Esperanto-medio. Por aliĝi, vere esperantistiĝi, verŝajne oni havu nekutiman karakteron: esti randa homo, persistemulo, nekonformisto, idealisto.

"Esperantistoj esperigas esperantojn"

Sub tiu ĉi devizo, antaŭ 21 jaroj, nederlandano Jacques Tuinder lanĉis la organizaĵon Agado E3, kun la celo kontraŭbatali la nenecesan blindecon en la mondo, aparte en triamondaj landoj. Li parolis pri tio en la Tago de Paco en Varsovio. Jen la kerno de lia parolado:

"Ni ekkonsciu pri tio, ke la nombro de okulpacientoj kaj blinduloj rapide kreskadas. En la jaro 1966, ki- am agado E3 faris siajn unuajn hezitajn paŝojn, oni parolis pri dek tri milionoj. En 1980 tiu nombro altiĝis al tridek milionoj, kaj antaŭ nelonge oni kalkulis, ke vi- vas inter ni kvindek milionoj da blinduloj. Kaj ni bone atentu tion, ke tri el kvar estas *nenecese* blindaj... Krome ni ne forgesu, ke en la jaro 2000 la nuna nom- bro duobliĝos kaj fariĝos cent milionoj! — SE... se la vidantoj restas blindaj kaj ne kompate vidas la nevidantojn; se ili ne sukcesas plej energie pligrandigi la okulkuracan helpon en multaj landoj de Azio kaj Af- riko.

"Agado E3 signifas, ke uzantoj de la lingvo de la Espero donas esperon al tiuj, kiuj ne perdis la esperon rehavi vidpovon, sanajn okulojn, akre vidantajn oku- lojn. Ĝis nun miloj da esperantistoj kaj aliaj noblaj ho- moj helpis pere de modestaj projektoj — okulkuracaj, brajlaj, optikaj, rekapabligaj — al vidhandikapitoj en ok landoj de la Tria Mondo. Kaj tiel ili samtempe ko- natigis la nomon de la lingvo de D-ro Esperanto tie, kie apenaŭ estas aŭ tute mankas esperantistoj."

Jacques Tuinder, Henegouwenlaan 35,
NL-1966 RH Heemskerk, Nederlando
Poŝtbankkonto: 10 20 100.

Konklude mi danku miajn instruistojn. Kiel mi lernis Esperanton? Per libroj. Per konversacioj kun mal- multaj geamikoj. Per mallongaj kursoj: Barlaston, Anglu- jo (1970) kaj San Francisco State University (dufoje). Per nova puŝ-butona radio mi aŭskultas la Esperanto- elsendon de Svislando. Mi elspezis kelkmilon da horoj en la lernado kaj praktikado de Esperanto dum mia vivo. Mi rikoltis multon, renkontis multajn, ĝuas la rezulton. Ne gravas, ke la mondo restas skeptika, sed gravas, ke ĝi restas stulta, surda, fermita ne nur ĉe la landolimoj sed ĉe la mensoj kaj koroj. Jen problemo pli granda ol tiu, kiun ni povas solvi tute per Esperanto. Sufiĉas, ke ni komprenu la nepran rolon de Esperanto en ĝia solvo.

Triono de jarcento ne longas, mi nun povas diri. Kiel pacifista judo, mi rimarkas, ke la paciga mesaĝo de Jesuo ankoraŭ luktas kontraŭ obstaklojn, foje metitajn de liaj plej altaj reprezentantoj. Ĉe la scienca kampo, vidu la problemon akceptigi la metran sistemon...

Paciencon! Serioza afero, sendube. Sed ne forgesu, amikoj: Se Esperanto ne finfine estas por ni ĝojo, ĝi ne finfine estas vojo.

E. James Lieberman (Usono)

Esperanto iĝis serioza temo

Nur tri fojojn ĝis nun, interlingvistikaj problemoj ludis rolon en la Internaciaj Kongresoj de Lingvistoj. En la 2a (Ĝenevo 1931), Otto Jespersen diskutigis la lingvistojn pri la problemoj de "artefarita lingvo" kaj popularigis la nocion "interlingvistiko". En Parizo, 1948, André Martinet donis la bazan raporton por la interlingvistika sekcio D de la 6a Kongreso. Kaj en la 14a Kongreso, kiu okazis de la 10a ĝis la 15a de aŭgusto 1987 en Berlino (GDR), Esperanto ricevis lokon sub la kadra temo "Unueco kaj diferenceco en la nuntempa lingvoscienco. Disciplinoj kaj interdisciplinaj alproksimiĝoj kaj rezultoj."

Pro la bona reputacio, kiun interlingvistiko ĝuas en lingvistikaj rondoj de GDR, ne estis malfacile proponi al la organizantoj tian enkadrigon. Tiel, dum la kongreso funkciis kiel n-ro 13 la oficiala "Ronda Tablo Interlingvistiko/Planlingvoj", unu el 22 tiaj "rondaj tabloj". Ĝin iniciatis kaj gvidis d-roj Detlev Blanke, Ronald Löttsch (ambaŭ el GDR) kaj Sergej N. Kuznecov (Moskvo). Dum du kunvenoj de la Ronda Tablo, kiujn ĉeestis meze 20-25 personoj, estis prezentitaj entute naŭ kontribuoj, po 20 minutoj, de la jenaj fakuloj: Johannes Irmischer (GDR), Francois Lo Jacomo (Francio), Hartmut Sörgel (GDR), Kuznecov, Dan Maxwell kaj Klaus Schubert (ambaŭ ĉe BSO en Nederlando), Stanislav Košecký (Slovakio), Blanke kaj Löttsch. Ĉiun prelegon sekvis vigla 20-minuta diskuto en la germana, angla, franca kaj ankaŭ kelkfoje en Esperanto.

En la kadro de alia Ronda Tablo, n-ro 8 "Aŭtomata tradukado", prelegis Victor Sadler, denove el BSO, pri la projekto DLT. Krom la "rondaj tabloj" funkciis 30 sekciaj kunsidoj, kun 15-minutaj prelegoj kaj nur 5-minuta diskuttempo: tie Sadler (en "Leksika semantiko"), Alicja Sakaguchi el FRG (en "Lingvoplanado kaj lingvopolitiko") kaj Schubert (en "Komputila lingvistiko") prezentis pliajn prelegojn kun interlingvistika enhavo.

Valoras substreki du aferojn:

1. Malsame al la 2a kaj 6a Kongresoj, ĉi-foje oni ne diskutis nur teoriajn demandojn sed povis grandparte bazi la referaĵojn sur la 100-jara funkciado de Esperanto. La preparkomitato de la kongreso aparte bonvenigis la esperantologiajn prelegojn, ĉar ili estis komprenataj ankaŭ kiel omaĝo al la 100-jara lingvo. Fakte tio estis en la spirito de la Unesko-rezolucio.

2. Estis interesa la lingva konduto de la lingvista kongreso. La oficialaj laborlingvoj estis la angla, rusa, franca kaj germana. La vera utiligo estis proksimume jena (resumotekstoj): angla 43,8%; germana 40,7%; rusa 10,5%; franca 5,0%. Tamen, dum la diskutoj la rusa ludis preskaŭ ne niun rolon kaj la franca estis relative malofte uzata: la ĉefaj lingvoj estis, proksimume samrange, la angla kaj la germana.

Resumoj de la prelegoj estis aŭ estos publikigitaj, kaj ekzistas planoj aperigi la plenajn tekstojn de la interlingvistika ronda tablo. La 15a Internacia Kongreso de Lingvistoj okazos post kvin jaroj; dato kaj loko ankoraŭ ne estas konataj. La 14a Kongreso montris, ke estas relative facile enigi interlingvistikajn temojn en la kongresprogramon, kvankam ne en la 18 plenkunsidajn ĉefreferaĵojn.

Detlev Blanke

Paŝoj en nova strategio

De pluraj jaroj evidentiĝas tio, ke la esperantistoj devas unuflanke eliri el siaj fermitaj rondoj kaj montri al la ekstera mondo, ke eblas uzi Esperanton sammaniere kiel iun ajn nacian lingvon, aliflanke klopodi atingi tiujn fakajn influhavajn neesperantistajn mediojn, kiuj principe kaj profesie interesiĝas pri transnaciaj lingvaj komunikaj problemoj, kaj uzi ties ekzistantan organizan strukturon.

Antaŭ pluraj jaroj mi hazarde konatiĝis kun AIMAV, internacia asocio, kiu origine alcelis la esploron kaj disvastigon de aŭdvidaj kaj aliaj modernaj instrumentoj, sed nun, per organizado de kolokvoj kaj publikigo de lingvistikaj verkoj, okupiĝas precipe pri la plivastigo de inter-

HECTOR HODLER (1887-1920)

Iom gravan datrevenon nia revuo maltrafis en oktobro: la unuan tagon de tiu monato, en la jaro 1887, naskiĝis en Ĝenevo la fondonto de UEA, Hector Ferdinand Hodler. Elstare inteligenta, kun forta karaktero, Hodler lernis Esperanton 16-jara kune kun Edmond Privat. En 1906 la brila duopo organizis la duan Universalan Kongreson en Ĝenevo, kiu laŭ Stettler "fiksas la sorton de Hodler: ne fininte la gimnazion li forlasis la benkojn de la lernejo kaj eniris sanktan Esperantujon." Dum la sekvaj 14 jaroj Hodler donis sian tuton al la Movado, kiel redaktoro de *Esperanto* kaj plentempa direktoro de UEA. Ankoraŭ post pli ol 70 jaroj frapas nin lia eksterordinara klarvido, montrita en dekoj da artikoloj, rilate ekvilibron de la praktikaj kaj la idealaj celoj de Esperanto. Lia frua morto pro tuberkulozo en 1920 estis vere tragedia perdo por la Movado.

Venontjare, honore al la 80a datreveno de UEA, ni planas publikigi en ni-aj paĝoj la prelegon de Ulrich Lins el la Internacia Kongresa Universitato en Varsovio: "La heredaĵo de Hector Hodler".



kultura komunikado. Sekve de kelkaj renkontiĝoj kun la prezidanto, Marcel De Greve (siampe profesoro pri latinida filologio ĉe la Ŝtata Universitato de Gento), du projektoj finfine efektiviĝis.

1. En la serio "Etudes linguistiques" (Lingvistikaj studoj), kiel n-ro 35, aperis antaŭ nelonge la libro *Studoj pri la Internacia Lingvo*, sub la redaktoreco de Michel Duc Goninaz. Enestas naŭ sciencnivelaĵaj artikoloj en la franca, angla, germana kaj Esperanto kun longaj malsamlingvaj resumoj. La verko estas havebla ĉe UEA (39,00 gld. plus sendokostoj) kaj ĉe AIMAV, kiu cetere diskonigas ĝin en neesperantistaj medioj de lingvistoj.

2. De la 28a ĝis la 30a de septembro 1987 okazis en salonoj de la Ŝtata Universitato de Gento la 23a Internacia Kollokvo de AIMAV pri la temo "La intereso kaj utilo de komuna interlingvo", kun kvin subtemoj:

- a) analizo de la lingva situacio ĉe la grandaj internaciaj organizaĵoj, publikaj kaj privataj;
- b) taksado de ĉiuj rimedoj uzataj por solvi la internaciajn kaj/aŭ enlandajn lingvajn malfacilaĵojn, kaj de ilia estonta evoluo;
- c) analizo kaj taksado de la praktikaj rezultoj de la fremdlingva instruado — bilanco kaj perspektivoj;
- d) esplorado de la eventualaj eblecoj de neŭtrala planlingvo kiel komuna interlingvo;
- e) ekzameno de la valoro kaj utilo de komuna interlingvo por la konstruo de vera Eŭropo de la Civitanoj kaj por firmigo de la nun estiĝanta internacia komunumo.

La laborlingvoj de la kollokvo estis la nederlanda, franca, angla kaj Esperanto. Ĉeestis partoprenantoj el Belgio, Britio, Francio, Germanio (FR), Hispanio, Luksemburgio kaj Nederlando. Subvenciis la kollokvon la Eŭropa Komisiono, la belga Nacia Fonduso por Scienca Esplorado, la Belga Loterio kaj la Ministerio pri Instruado.

Inter la esperantistaj kaj neesperantistaj partoprenantoj prelegis ekzemple Roger Goffin kaj Michael Cwik, funkciuloj ĉe la Eŭropa Komunumo, lingvo-specialistoj Yvo Peeters, Klaus Schubert (el la DLT-projekto), Wil Knibbler (estrarano de AIMAV) kaj Michel Duc Goninaz, kaj skribis kontribuis Francois Dessart de la UN-universitato por paco kaj Andrea Chiti-Batelli, konsilanto ĉe la itala senato. Ĉiujn prelegojn sekvis vigla kaj funda diskuto. Laŭ deziro de la partoprenintoj, malgranda laborkomisiono de AIMAV preparos dokumenton pri eventualaj sekvoj de la kollokvo. La natureca uzo kaj esprimkapablo de Esperanto aparte forte impresis la reprezentanton de EK, kiu tuj informiĝis pri la Esperanto-kerno en Bruselo.

Ankaŭ alian gravan profesion medion Esperanto komencis penetri. AILA, la Internacia Asocio pri Aplika Lingvistiko, dum sia mondkongreso en Sidnejo (Aŭstralio) en aŭgusto akceptis la proponon de E. Symoens, faritan post longa kaj intensa korespondado kun la respondeculoj de la Asocio, starigi apartan komisionon, kiu sisteme kaj profesie esploros ĉiujn aspektojn de la internacia lingva komunikado. Jam ekzistas detala laborskemo, kaj pluraj eminentaj esperantistoj akceptis membriĝi en la komisiono. La nova prezidanto de AILA estas Albert Waldman el Usono, kiu ĉeestis la Universalan Kongreson en Pekino kaj por tio lernis Esperanton. Poste li donis tre favoran raporton pri siaj impresoj en faka ĵurnalo.

E. Symoens (Belgio)

Junularo

Por franca-germana amikeco

Inter la 18-a kaj 20-a de septembro okazis granda german-franca junulara forumo ĉirkaŭ la baroka kastelo Ludwigsburg en sud-okcidenta Germanio; la okazo por tiu festo estis fama parolado de la franca generalo de Gaulle "Al la germana junularo" antaŭ 25 jaroj ekzakte samloke, kiun sekvis starigo de fonduso subvencianta german-francajn junularajn renkontiĝojn (fonduso, kiun ankaŭ uzas la junularaj E-organizoj de Francio kaj FRG).

Je vendredo okazis diskutrondoj por ĉ. 500 aktivuloj de junularaj organizoj — interalie oficiale planitaj diskutrondoj pri la "lingvaj problemoj dum la franc-germanaj renkontiĝoj" kaj pri "Esperanto kaj la internacia kompreniĝo". Je sabato en la kastela korto okazis granda festo, kiun partoprenis entute pli ol 5000 gejunuloj el Francio kaj FRG kaj pliaj 10 000 interesitaj civitanoj el sud-okcidenta Germanio. Kadre de tiu festo la partoprenantaj junularaj organizoj prezentis siajn aktivecojn dum granda "bazaro de la eblecoj" — unu el la plej bone ekipitaj kaj plej multe vizitataj standoj estis la komuna informejo de Germana Esperanto-Junularo (GEJ) kaj Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO), prizorgata de 20 aktivuloj de tiuj du organizoj. 2000 speciale produktitaj franc-germanaj flugfolioj pri Esperanto elĉerpiĝis ene de 2 horoj, duonan horon poste la tuta franc-lingva informmaterialo pri Esperanto estis for; kaj laŭ vespere farita statistiko entute disdoniĝis pli ol 10 000 german-lingvaj flugfolioj de Germana Esperanto-Junularo. Sed pli grave ol tiu statistiko estas, ke la junulara Esperanto-movado estis akceptita kiel memkomprenebla parto de la junulara movado por internacia kompreniĝo.

Thomas Pusch (FR Germanio)

Trans la sovetiaj limoj

Malmultaj scias, ke en Sovetunio ĉiujare estas organizata la t.n. Sovetia Esperantista Junulara Tendaro, t.n. "SEJT". Kutime ĝi okazas somere kun la partopreno de amaso da esperantistoj el ĉiu parto de tiu grandega lando.

Ĉi-jare, unuafoje post pluraj jardekoj, ankaŭ eksterlandanoj povis ĉeesti tiun festivalan manifestiĝon. En la "apud-Moskva" urbeto Rostov Velikij inter la 12a kaj 19a de aprilo okazis la ĉijara renkonto kun la partopreno de hungaraj, bulgaraj kaj sovetiaj esperantistoj. La internaciaj junularaj E-aranĝoj ja havas pli-malpli la samajn trajtojn, sed — kiel konate — tiun internacian vivon la sovetiaj esperantistoj malofte partoprenas, do ĉe ili la programo (kaj ankaŭ ties etoso) multe diferencas de la kutima. La tendaran vivon gvidis t.n. "Tendara Komitato" (tre bona afero!), kies membrojn elektis la partoprenantoj jam la unuan vesperon. Estis aparte interesa la "Malfermita Koncerto", kiun oni aranĝis por la neesperantistaj unuvesperaj urbaj gejunuloj (pli ol 300!), prezentante al ili la lingvon, movadon, servojn kaj kulturon. La unuan fojon ni vidis la famegan KGS-n (konkurso pri gajeco kaj spriteco), kiu

tiel ekplaĉis, ke ni decidis nepre enkonduki ĝin ankaŭ ĉe niaj hungaraj programeroj.

La tendaron vizitis ankaŭ Volodja Soroka (memoru pri IJK-83 en Debrecen), la fama, tutlande konata kaj eksterordinare populara profesia kantisto. Eble nun mi malkaŝas sekreton, sed vi sciu, ke en la fino de '87 aperos aparta granda sondisko kun liaj Esperantaj kantoj ĉe la tutsovetia ŝtata disko-eldonejo Melodija!



Estis ankoraŭ multaj seminarioj pri la bulgara kaj hungara spertoj, pri TEJO-aferoj, pri medioprotektado, kaj ne lastvice pri la enlanda movado. Post la fino de la tendaro en Moskvo denove atendis nin surprizo. Malgraŭ la neĝado (en la fino de aprilo) atendis nin amaso da moskvaj esperantistoj en sia klubejo. Estas nur bedaŭrinde, ke neniuj el la movadaj gvidantoj en ASE partoprenis aŭ la tendaron, aŭ la moskvan bonvenigon... Krom tio, la sola afero, kiu povis malpliigi la bonfarton de ni, estis la efiko kaj postsekvo de la fama "seka leĝo". Sed kion fari...?

Do, resume oni povas diri, ke tiu aranĝo estis neforgesebla por ĉiu (por eksterlandanoj tutcer-te)! Estis ja kortuŝe revidi la iam jam renkontitajn vizaĝojn, la malnovajn amikojn, persone konatiĝi kun la korespondaj partneroj, kaj estis entuziasme vidi la sovetian Esperanto-movadon. Mi forte esperas, ke tiu ĉi renkonto ne pasos sen spuroj, kaj ĉiujare ankaŭ eksterlandanoj rajtos ĉeesti tiun unikan eventon.

Szilvási László (Hungario)

Maldekstre: La oficiala karavano de ASE en Varsovio, kvankam pli ol kutime granda, reprezentis nur parton de la — precipe junaj — ĉeestantaj sovetianoj.

Nova direktoro por la Centra Oficejo

La Estraro de UEA okazigis t.n. "teknikan kunsidon" en Roterdamo, la 2an kaj 3an de oktobro, kun la celo doni apartan atenton al administraj demandoj de la Asocio. Kvankam origine nur kvin estraranoj — tiuj, kies taskoj plej intime ligiĝas kun la funkciado de la Centra Oficejo — planis veni, finfine entute sep ĉeestis. La du mankintaj (Umeda kaj Haszpra) poste voĉdonis skribe pri la faritaj proponoj.

Preskaŭ duonon de la tempo okupis diskutado pri tri ŝlosilaj postenoj inter la oficistoj: la Ĝenerala Direktoro, la Direktoro de la Centra Oficejo kaj la Konstanta Kongresa Sekretario. La fono por tiuj diskutoj estas la longedaŭra emo de la sidejo de UEA periode submetiĝi al krizoj, malfruoj kaj malorganizigo. Kiel ekzemplo, la posteno de Ĝenerala Direktoro, establita en 1980, neniam estis kontentige difinita rilate al sia taskaro kaj tereno de respondeco. Tiun mankon finfine priatentis la Estraro, kiu alvenis al skriba interkonsento kun la nuna ĜD, Simo Milojević, por klare apartigi liajn funkciojn disde la aliaj de la Oficejo. Se paroli ĝenerale, la ĜD respondecas pri la informado kaj pliefikigo de la Komitato kaj Estraro kaj tenas superrigardon pri la funkciado de aliaj oficejoj kaj institucioj de UEA.

Ĉiu respondeco pri la funkciado de la Centra Oficejo nun restas ĉe ties Direktoro. La ofichavanto de februaro 1986, Osmo Buller, foriras fine de oktobro, kaj la Estraro esprimis al li grandan dankon pro liaj servoj. La nuna relative bonorda kaj efika funkciado de la Oficejo fakte ŝuldiĝas plejparte al la laboroj de Buller, kiu transprenis la direktorecon en unu el la plej malfacilaj jaroj de la C.O. Kiel lia posteulo ĉeestis la kunsidon Neil Salvesen (Britio), internacie plej konata kiel la eldonanto de Esperantaj Kajeroj kaj la ĉi-jara sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA. Lia ekposteniĝo kiel Direktoro estas antaŭvidata por la mezo de novembro.*

Pri la posteno de Konstanta Kongresa Sekretario, kiu vakas de post la foriro de Diccon Masterman en 1985, la Estraro ellaboris "profilon" kaj taskis la Ĝeneralan Direktoron okupiĝi pri eltrovo de nova KKS ĝis aŭgusto 1988. La kongreson en Roterdamo prizorgos nederlanda LKK kunlabore kun la Centra Oficejo. Intertempe la Kongresa Regularo estas profunde reviziata, kaj oni traktas pri estontaj UK-oj en la eventuala (post 1989 tre provizora) sinsekvo Brajtono—Havano—Bergen—Valencio.

Aliaj administraj demandoj estas daŭre sub diskuto kaj prilaboro. Ili koncernas i.a. la proponitan Azian Oficejon, la Esperanto-centron en Bjalistoko, sendependigon de Grafika Centro Antverpeno disde UEA kaj diversajn aliajn projektojn, inkluzive tiujn — eldonadon de libroj, la Internacian Patronan Komitaton, memorlibron k.s. — kiuj rilatas al la Jubilea Jaro. Ni klopodos daŭre teni niajn legantojn informitaj pri evoluoj sur tiuj kampoj.

Por profiti de la forta impeto kiun estigis la informa ondo de la lastaj monatoj, la Estraro decidis oficiale daŭrigi la jubilean laborprogramon de UEA ĝis la roterdama UK. Tie okazos ferm-ceremonio pri la Jubileo. **mf**

* Temas fakte pri interŝanĝo de roloj: ĉar Buller transprenis la prizorgadon de la Belartaj Konkursoj.

István Szerdahelyi (1924-1987)



La 21an de aŭgusto forpasis en Budapeŝto d-ro István Szerdahelyi, fondinto kaj docento de la Esperanto-fako ĉe la Universitato Eötvös Loránd kaj Honora Membro de UEA, post kelkmonata grava malsano kiu forrestigis lin de la Jubileaj kongresoj. Per lia morto la Movado perdis unu el siaj plej motivitaj kaj efikaj aktivistoj en la kampo de edukado.

De la komenco István Szerdahelyi okupiĝis pri lingvoj: li parolis la rumanan kaj hungaran denaske, ankoraŭ juna konatiĝis kun la franca, la germana kaj la klasikaj lingvoj, kaj kiel militkaptito memstare alproprigis la rusan lingvon. Pri tiu lasta li diplomiĝis en 1953 — kvankam jam antaŭ tio aperis liaj unuaj tri lernolibroj pri la rusa, kiuj en postaj eldonoj estis uzataj tra la sesdekaj jaroj por ĉiuj klasoj de la gimnazioj. Pri la temo de fremdlingva instruado li verkis amason da artikoloj en la hungara.

Sian intereson pri instrumentodiko li alportis al la studo de Esperanto, kiun li eklernis en 1949. Li ludis ŝlosilan rolon en la formado de la Esperanta instru-sistemo en Hungario en la sesdekaj jaroj, kaj pere de la metodika ĉapitro en *Gvidlibro por supera ekzameno* (1964 kaj 1979) multe influis ankaŭ la internaciajn normojn sur tiu kampo. Liaj lernolibroj *Esperanto 1* kaj *Esperanto 2* aperis en kaj la hungara kaj Esperanto; la unua atingis kvar eldonojn en la hungara, kun entute preskaŭ 80 000 ekzempleroj (en lando de nur 10 milionoj da loĝantoj!). Per multaj hungarlingvaj artikoloj kaj pluraj libroj, inter kiuj *Bábelről a világnyelvig* gajnis Nivel-premion en 1978, li kontribuis al la disvastigo de intereso pri la Internacia Lingvo.


En 1966, kun la helpo i.a. de la eminenta hungara lingvisto kaj esperantisto Géza Bárczi, Szerdahelyi sukcesis ekfunkciigi Esperanto-fakon kadre de la Filologia Fakultato en la budapeŝta universitato Eötvös Loránd. Tiu fako restas eble la plej grandioza monumento al sia fondinto: necesis eksterordinaraj fortostreĉoj, por ke ĝi restu funkcia tra la jaroj kaj iom post iom akiru certan prestiĝon. Tiu kresko de prestiĝo cetere videblas en la fakto, ke Szerdahelyi estis nomumita universitata adjunkto en 1971 kaj plena docento en 1983. Entute pli ol cent homoj — precipe hungaroj, sed ankaŭ el aliaj landoj — ricevis diplomon sub lia instruado. Preskaŭ ĉiujn bazajn studmaterialojn li ellaboris mem, kiel verkisto aŭ redaktoro, kaj tiel ankaŭ grave kontribuis al la esperantologia literaturo.

En la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj li gvidis la Ekzamenan Komisionon ekde 1970, de 1973 ankaŭ la Scienca Esplorinstituton, kaj en 1985 elektiĝis ĝia pre-

zidanto. Sub lia redakto *Internacia Pedagogia Revuo* komencis rekapti la kvaliton kaj prestiĝon, kiuj iam karakterizis ĝin. Pluraj aliaj projektoj estis prilaborataj de li kiam li malsaniĝis; unu el ili, la longe sopirata *Granda Hungara-Esperanta Vortaro*, kies kompiladon li gvidis, aperos en 1988.

István Szerdahelyi postlasis, en la formo de pli ol cent artikoloj kaj libroj en Esperanto kaj simila nombro pri Esperanto en la hungara, imponan intelektan heredaĵon. Tamen, lia plej daŭra kontribuo oni devas kalkuli tiujn instruistojn kaj esperantologojn, kiuj havis la bonŝancon rekte inspiriĝi de li kadre de la budapeŝta universitato, kaj kiuj plukonstruos sur liaj atingoj.

Cyril John Adcock (1904-1987)



Profesoro Cyril John Adcock, eminenta psikologo, humanisto kaj tutviva konvinkita esperantisto, mortis la 5an de junio en Velingtono, Novzelando, 82-jara.

John Adcock realigis longan kaj distingan karieron kiel instruisto kaj poste docento kaj profesoro pri psikologio: fako, en kiu li reprezentis UEA de post 1959. Post sia emeritiĝo de la Universitato de Velingtono en 1970 li fariĝis Administra Sekretario de la Laborista Eduka Asocio kaj de la Novzelanda Psikologia Asocio (kiun li kunfondis en 1965). Ekde 1969 li kunlaboris en la redaktaj komitatoj de *La monda lingvo-problemo* kaj ties posteulo *Lingvo-problemoj kaj lingvo-planado*. En sia lasta jaro li fariĝis profesoro pri homa kibernetiko ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj Sanmarino, kaj nur kelkajn tagojn antaŭ sia morto eksciis pri sia honoriĝo per la Ordeno de la Brita Imperio (OBE).

De sia junaĝo li propagandis Esperanton, kiun li konsideris grava helpo por homaranismo kaj mondpaco. Li ludis gravan rolon en la landa movado, i.a. kiel prezidanto de NZEA, ofta preleganto ĉe lokaj kluboj kaj aparte per sia diligenta kaj influa kampanjo enkondukigi Esperanton kiel studobjekton en novzelandaj lernejoj. Inter pluraj fakaj libroj verkitaj de li, unu aperis en Esperanto surbaze de prelegserio en la Someraj Universitataj Kursoj — *Fundamentoj de psikologio*, SUK-kajeroj 1976. Pri la pacmovado li multe okupiĝis en siaj lastaj jaroj, oficante plurjare kiel prezidanto de la novzelanda Ŝtata Konsila Komitato pri Malarmado kaj prezidanto de la novzelanda UN-Asocio.

Postvivas lia edzino, d-rino Ngaire Adcock, liaj du filinoj (ambaŭ konataj anglalingvaj verkistoj) kaj liaj ses nepoj kaj ses gepranepoj.

Nur per unudirekta strebado

Mi perceptas el la maja numero de *Esperanto*, ke en la movado plifortiĝas la realismaj kaj kritikemaj voĉoj, kiuj akcentas la solvendajn problemojn kaj taskojn. Ni devas krei realajn avantaĝojn por la uzantoj de Esperanto. Por atingi tiun celon ni devas revizii nian strategion kaj taktikon. Nur per laboro komuna kaj direktita je unu prioritata tereno ni povas krei tiajn realajn avantaĝojn, kaj ni devas vaste kaj profunde diskuti, kiu tereno estas la plej perspektiva.

En la Estrara Raporto 1985 (*Esperanto* 1986/p.114) oni povis legi kritikojn pri la eldona politiko de la siatempa Scienca Eldona Centro, eĉ opinion pri la nebezzoneco de fakaj libroj. Post apero de kelkaj faklibroj oni spertis, ke la vendorapido estas ege malgranda. Tamen kamparano scias, ke el unu semo kreskas nur unu plantaĵo; kaj ĝardenisto flegas arbojn dum longaj jaroj ĝis la unuaj fruktoj. Kial do atendas iu ajn, ke post apero de kelkaj faklibroj la fakuloj amase esperantistiĝos? Por pruvi la bezonecon de faklibroj, oni grupigu la homojn en tri kategoriojn:

1. homoj indiferentaj, ne havantaj komunikan bezonon;
2. homoj latentaj, kiuj bezonas efikan internacian komunikilon, sed urĝe, kaj ne havas tempon atendi la "venkon" de Esperanto;
3. homoj aktivaj, kiuj havas tempon kaj emon ellerni ne tre profitdonan lingvon, por kiuj tamen la tuja komunikado ne estas vivgrava.

Plejparte fariĝis esperantistoj anoj el la tria grupo, el la dua grupo nur sporade. La rezervoj de la tria grupo elĉerpiĝis, kaj laŭ mi pro tio stagnas la movado. La dua grupo estas almenaŭ centoble pli granda ol la tria, kaj ni pensas pri ilia konvinko, kiam ni parolas pri la "fina venko".

Kial do lernus ili Esperanton, kiel teni ilin en Esperantujo? La unusola respondo: pro la uzebleco (t.e. informinterŝanĝa valoro) de Esperanto. Ilin konvinkas nek miliono da afiŝoj, nek dekduo da nacilingvaj priesperantaj revuoj, nek kelkdeko da pli-malpli sciencpopularigaj libroj. Pro tio nia plej grava tasko estas pligrandigi tiun informan rolon de Esperanto.

Neniu povas krei simultanee informamason por ĉiu subgrupo, por ĉiu fako. Sed ni ĉiuj komune kapablas krei necesan, konvinkan informkvanton por unu fako. Laŭ mia opinio la kandidata sfero devus kontentigi ses postulojn (eble ne en ordo de graveco):

1. la koncernaj fakuloj daŭre kaj forte soifu informinterŝanĝon;
2. la informfluo okazu grandparte skribe aŭ presite;
3. la komunikadon subtenu/instigu entrepreno aŭ institucio;
4. la faktereno estu malvasta sed la nombro de fakuloj alta;
5. la temo estu ne periferia, ligiĝu kun aliaj temoj;
6. Esperanto jam havu tiufakan tradicion.

Mia konkreta propono estas la tereno de komputoscienco, komputiloj kaj kibernetiko. Traduku kaj eldonu ĉiujare 50-60 titolojn. Organizu internacian tradukreton por fakartikoloj, tradukservon ĉe ekspozicioj, konferencoj ktp por tiuj, kiuj parolas Esperanton. Antaŭ la foiroj traduku la propagandilojn de la entreprenoj, la resumon aŭ la tutan prelegon de la prelegantoj.

Kiu plenumos la taskojn? Unuavice entreprenemaj kaj kapablaj esperantistoj. Sed krome, laŭplane ni devos elformi tavolon de fakuloj, kiujn ni rigardu ne estontaj esperantistoj sed duonprofesiaj kunlaborantoj. Ni devos salajri ilin eĉ dum la lernokursoj, nur tiel ni povos postuli altnivelan, profesinivelan lingvoscion. Studentoj ĝenerale havas pli da libertempo lerni kaj labori, por ili ankoraŭ sufiĉas malpli da salajro, por ili estas alloge partopreni foirojn aŭ kongresojn eksterlande.

Miatakse kelkdeko da kunlaborantoj ĉiulande sukcese plenumus la menciitajn taskojn.

d-ro Kolomano Kovacs

Kun B.u.3. 3/7

H-3792 Sajobabony

Hungario



tre aktuala en la hodiaŭa movado. Jam ĉi-jare aperis kelkaj leteroj en la Esperanta gazetaro. Estas tute evidente, ke la iom malpreciziganta kontentigas grandan nombron de movadanoj — kiel subtrekis i.a.

subajn tekstojn, ambaŭ koncizigitajn el pli longaj manuskriptoj. Ĉi tiu komunan ideon: la gravecon de la faka aplikado de Esperanto ĉi tiu ne estas ĝuste la celo de diskut-rubriko?

Malsamaj signifoj de Esperanto

Esperanto havas malsamajn signifojn por malsamaj landoj kaj kontinentoj. Ĝi havas ankaŭ malsamajn signifojn por malsamajn popolojn en la sama lando. Aldone, Esperanto havas multajn signifojn samtempe por unuopaj individuoj. Kaj, ĝi eĉ ofte havas malsamajn signifojn, dum malsamaj tempoj, por la sama persono!

Ĉion ĉi oni povus facile konstati pere de tralegado de artikoloj, kaj pere de trarigardo de anoncetaro pri korespond-deziroj en la Esperanta gazetaro. Sed por kelkaj homoj, ekz. en Pakistano — laŭ amiko pakistana — Esperanto havas nenian signifon. Ili diras: "Ni havas multajn naciajn lingvojn, kaj la urduan kiel nian supernacian lingvon, kial do ni devus havi alian supernacian lingvon, kiel Esperanton? Kion ĝi ofertus al ni krom plian perdon de tempo, kaj malŝparon de mono?". Aŭ ni rigardu la kazon de Hinda Unio, kie popoloj batalas por regiona iden-

teco helpe de sia propra lingvo inter pli ol 15 ĉefaj rivalaj lingvoj! Kion Esperanto povus kontribui al ilia menso-paco, aŭ por solvi ilian identec-krizon post pli ol tricent jaroj de anglalingva kultura hegemonio? La samon, plej verŝajne, oni povus diri pri multaj afrikaj nacioj, kun la tribaj konfliktoj kaj multaj koloniaj lingvoj de Okcidento! En Afriko ekzistas kelkaj supernaciaj lingvoj, kiel la svahila. Por afrikanoj, kiel por multaj pakistananoj kaj hindoj, Esperanto ankoraŭ ne povas havi seriozan signifon. Kaj simile, kial do ekz. iu arabo lernus Esperanton, kiam li/ŝi povus vojaĝi al multaj arabaj landoj senbezone de iu lingvo krom sia propra — jam la sesa oficiala lingvo de UN? Aŭ kial iu latin-amerikano lernu Esperanton, kiam vojaĝante al pli ol 20 landoj en sia regiono, eĉ en partoj de Usono, Eŭropo kaj Afriko, li/ŝi ofte povas paroli hispane?

La signifo de Esperanto por eŭropanoj nur en konteksto de iliaj propraj kulturaj atingoj kaj evolukondiĉoj estas komprenebla. En lokoj, kie tiuj evolukondiĉoj ne ekzistas, kiel en Azio kaj Afriko aŭ en Sud-Ameriko, tiuj signifoj por alikulturanoj facile povus tute, aŭ parte, esti puraj malsignifoj. Tial, la signifo de Esperanto por la dua jarcento de ĝia evoluo devus esti redefinita por malsamaj klasoj, malsamaj sociaj tavoloj, por diversaj malplimultoj, religianoj aŭ ideologiaj komunumoj, por komputiloj, por malsimilaj etapoj de la vivo, kaj la kulturoj de diversaj partoj de la mondo.

Esperanto estas samtempe ambaŭ, kaj Unueco kaj Varieco. Ni devas difini la Variecon ene de Unueco. Ankaŭ la Supernacieco de Esperanto bezonas difinon. Ĝia aplikado devas esti pli detale kaj pli ekzakte difinita. Esperanto bezonas novan strategion, kaj ĝia aplikado novajn taktikojn. El-lernado de Esperanto estas facila, sed ĝia plena aplikado ankoraŭ ne estas tiel facila, kiel ĝi ŝajnas!

La plej lasta aplikebleco de Esperanto, pri kies agnosko Irano sincere jam kontribuis, estas la nova signifo de Esperanto, kiel transmiŝilo de scienco kaj tekniko por la Tria Mondo. Multaj popoloj, inkluzive de multaj alte progresintaj kleruloj kaj respondecaj sociaj gvidantoj, estas ankoraŭ absolute ne konsciaj pri tiu ĉi potencialo de Esperanto. Tamen Esperanto povus riĉe kontribui al iu necesa revolucia ekvilibro de kono kaj sciencoteknikaj informoj inter Nordo kaj Sudo, sen kio la mondo neniam povos atingi la veran inter-komprenon kaj pacon!

Por scienc-teknika pliriĉigo de la Tria Mondo, se nur en ĉ.200 branĉoj de scienc-teknikliteraturo, kaj aparte por ĉiu fako ĉ. 10 plej ampleksaj, normaj kaj bazaj lernolibroj — entute 2000 libroj — el kelkaj scienc-teknike evoluintaj lingvoj, tradukiĝus en Esperanton, subite, mutaci-simile kaj vulkaneske, ek-burĝonus ia altkultura evoluo, senprecedenca ekde Gutenberga epoko, en la Tria Mondo. Tiam ĉiu studento kaj profesoro povus sufiĉe memfide kaj facile profiti de tiuj tradukitaj libroj, ege rapide, kaj eĉ tre malmultekoste, post nur 150-250 horoj da Esperanto-lernado intensive en du-tri monatoj. Tiam ni havigus preskaŭ 90% de hodiaŭa scienca kono je dispono de la plimulto de la homaro en la Tria Mondo. Kaj ĝuste tial, la publika edukado, kiel la klerigado de respondecaj funkciuloj, aŭtoroj, instruistoj ktp, devus esti la nova strategio de Esperanto en la venonta jarcento de ĝia vivado!

Ĵila S. Saheb-Zamani (Irano)



Epokofara paŝo en la Esperanta filmkulturo?

Iuspecan sensacion kreis la apero en Varsovio de klasika hungara filmo, "En Eŭropo ie". Voĉsinkronigis ĝin en Esperanto profesia, neesperantista reĝisoro, István Vajda, kaj post la unua prezento mi intervjuis lin (kun la helpo de hungara interpretisto) pri liaj spertoj kaj planoj.

Unue, kial vi elektis traduki filmon ĝuste en Esperanton?

Vajda: Mi laboras en hungara instanco, kiu tradukis jam ĉirkaŭ 600 filmojn en la hungaran lingvon. Antaŭ eble du jaroj mi elkovis la ambicion traduki filmon el la hungara en alian lingvon — sed ne sciis, kiun lingvon elekti. Tiam, pasintjare, mi hazarde trafis hungarlingvan artikolon pri la Jubileo de Esperanto; estis tie menciita Hungara Esperanto-Asocio, do mi prenis telefonlibron kaj...

Kaj la respondo de HEA estis pozitiva?

Vajda: Jes, tuj mi parolis kun Imre Szabó, kiu poste tradukis la tekston de la filmo en Esperanton. Plej malfacila estis kompreneble la financado. Finfine la direkcio de nia nacia film-sinkroniga instanco alprenis du trionojn de la kosto, kaj HEA donis la ceteran trionon. Tamen estis tiu am jam majo, kaj ni devis iom rapidi por fini la filmon ĝis la kongreso en Varsovio. Temis kompreneble ne nur pri sinkronigado, sed pri eltrovo de bona ekzemplero, de aktoroj kiuj jam parolas aŭ pretas studi Esperanton, pri diversaj teknikaj problemoj...

Kaj kio precize instigis vin elekti ĉi tiun filmon por traduko en Esperanton?

Vajda: Nu — la filmo estas klasikaĵo, kaj ankaŭ ĝi ŝajnis al mi tre bona simbolo por la Esperanto-movado. Temas pri bando de junuloj, militorfoj, kiuj vagas tra ruinigita kamparo serĉante iun solidan lokon, iun hejmon. Vi memoras, ke ili trovas tiun ruinigitan kastelon sur alta roko... kaj ankaŭ la nomoj de la ĉefroluloj, ekz. la du "Petro"j, eĥas tiun temon. Al mi ŝajnas, ke ankaŭ la Esperanto-movado ankoraŭ serĉas sian lokon en la socio. Sed cetere, estis interesa filmo el teknika vidpunkto. Estas tre diversaj voĉoj, el diversaj sociaj klasoj kaj fonoj, kaj provi kapti tion en Esperanto estis bona defio.

Ĉu tiu ĉi sperto instigas vin al novaj planoj por la estonteco?

Vajda: Jes, mi efektive ŝatus realigi tutan serion da filmoj, eble ses ĝis dek el la monde plej konataj — do precipe nehungaraj. Mi celus inkludi ekzemplojn de tre diversaj ĝenroj, ekzemple mi jam pripensas la faman desegnofilmon de Disney "Neĝulino kaj la Sep Nanoj". Ĉiu filmo kostas inter 20 kaj 30 mil germanajn markojn por produkti, kaj por rehavi tion ni devus disvendi eble 1500 videobendojn. Sed por efektiviĝi ĉion ĉi, ni unue bezonas sufiĉe grandan kapitalon. Mi jam parolis kun diversaj homoj ĉi tie, sed ankoraŭ mankas iuj seriozaj investantoj. Eble vi povus publikigi en via revuo...

Jen, do, propono por niaj esperantistaj entreprenumoj. Vajda impresas kiel serioza homo, kaj lia projekto povus grave kontribui al kreo de "populara" kulturo en Esperanto. Estas malferma demando, ĉu eblas disvendi po 1500 videobendojn eĉ de unu filmo, sed sen provi oni nenion atingas... Interesiĝantoj skribu al HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest, kiel eble plej baldaŭ. **mf**

BELARTAJ KONKURSOJ 1987 BRANĈO POEZIO ● 2-A PREMIO

Tukpinĉiloj

La korbon plenan ŝi ekprenas,
per svingo surkapigas, tenas, kaj
leĝerpiede subenkuras laŭ
ŝtuparo grizbetona. Estras majo.

Ŝi vikle marŝas spinrektega
laŭ arka trairej' ombrega, jam
subitas suna lum' kontraste kaj
la jupo ŝvela brilruĝiĝas flame.
Maljunulinon ŝi ne vidas
nek ties eksbridon aŭdas, sed
en kort' komuna interbloka, per
eksving' la vergplektaĵon metas teren.

La ruĝaj manoj nun laboras;
tolaĵpureco bonodoras; jen
rondbraka, flekstalia, la virin'
vestetojn kaj vestegojn prenas pene
pendigas per la tukpinĉiloj

blanklignaj, manfaritaj iloj de l'
ciganoj aĉetitaj, almozul-
okulaj, tie ĉe la pordoj, ŝtele.

Samtempas butikumaj planoj.
Ne helpas pensi: ĉu ciganoj ja
povrulas same kiel ni ali-
aj? Ĉu povrecon kaŝi pli lojale?
Balancas jam malplenan korbon
la junedzin'; alkuras domon; ne
konscias, ke blankharulino el
la klarobskuro gvatas ironie.

La pezan korbon ŝi ekprenas;
per svingo surkoksigas, tenas; jen
ŝi subengrimpas zorgpiede laŭ
grizeca ŝtupkrutaĵo. Septembras plene.

Laŭ arka trairej' ombrega
ŝi marŝas svinge spinrektega, grac-
e replatiĝis ŝia ventro, ŝi

Problemoj de izoliteco

Kuba ŝtata organizo, Domingo García. El la hispana trad. de Kuba Esperanto-Asocio. Havano: José Martí, 1985. 146p. 21cm. Prezo: 7,50 gld.

Kubo fariĝis socialisma ŝtato en 1959. Tiu decido necesigis profundajn ŝanĝojn en la socia kaj ŝtata sistemoj. La libro priskribas la evoluon, komencas ĉe la transformiĝo, notas sukcesojn kaj misvojojn kaj montras tre detale la nun validajn regulojn en Kubo.

Partoprenas en la gvidado de Kubo: la Komunista Partio, la ŝtataj organoj, la amasaj organizaĵoj. Ĉiu el ili konsistas el pluraj elementoj, kaj ĉiuj organoj ekzistas nacie, province kaj loke. Temas do pri komplika reto de horizontalaj kaj vertikalaj interdependecoj. Aldoniĝas la diversaj potencstupoj, kiujn la libro prezentas sincere sen belaj vortoj por amikiĝi ĉie ajn. Klarigi ĉion ĉi per vortoj kondukas kompreneble al malfacila legaĵo, kiu unuavice kontentigas la scivoleman fakulon.

La libro estas zorge produktita kaj sen eraroj krom misuzo de iuj vortoj (ekzemple: tribunalo *prononcas* verdikton). Ĉar temas pri faklibro, ĝi prezentas ankaŭ terminologian problemon. Kelkaj fakvortoj estas kompreneblaj malgraŭ signifo iom ekster PIV (ekzemple *fakulto*). Serĉante terminojn la kubaj tradukintoj uzis vortojn el kristanismo laike, ekzemple *indulto*, *precepto*. Tiuj kred-

terminoj do estas transirantaj en la ĝeneralan vortaron. La literatura neologismo *kurta* aperas kvarfoje en la libro, eĉ ĝi frapas kiel ĝia unua vorto. Mia timo, ke novvortoj ne restas en flanka pozicio sed ŝveligas la lernaĵon, praviĝas.

La teksto pri la jura sistemo en Kubo uzas vortojn el la ĝenerala vortostoko, kiuj estas korektaj kie ili staras, sed vekas dubojn, ĉu la aŭtoro vere volis tion esprimi. Ekzemploj: Ĉu "streĉaj" rilatoj estas tre intimaj aŭ iom tiklaj? Se prezidanto "direktas" la laborsesiojn de la Asembleo, ĉu li aŭ ŝi simple prezidas kaj gvidas, aŭ ĉu tiu prezidanto irigas la Asembleon al la celo (kiel PIV difinas)? Tia necerteco kie necesas precizeco estas tre ĝena en faklibro. La libro el Kubo instigu ŝtatfakulojn kaj esperantologojn akiri klarecon tiukampe. Post 100 jaroj de Esperanto ne regu tiaj duboj.

Tradukanto de la libro estas "Kuba Esperanto-Asocio". Tiu kolekto uzas kelkajn apartaĵojn, ekzemple *far*, *ĉi* (anstataŭ *tiu*) kaj kelkloke aktivajn verbojn el participoj (*enirantas*, *subordigatas*), kion mi opinias ne bona. La pasivan particon ni nun faris tiom komplika, ke ne nur Kubaj esperantistoj ŝanceliĝas inter -ata kaj -ita. Denove mi ege bedaŭris, ke en la participa diskuto la facileco de la lingvaĵo ludis neniun rolon. Aŭtoroj el Kubo (skribante: "La provizoraj institucioj definitive estis anstataŭataj de la novaj organoj."), kiuj ne havas la eblon multfoje troviĝi en internaciaj rondoj kaj praktiki Esperanton internacie, devas kompreneble suferi sub tia komplikaĵo.

Werner Bormann (FR Germanio)

sin fleksas beltalie, senbalaste.
Per kalaj manoj, ostaj brakoj,
robote ŝi pendigas aĵojn, eĉ
ne pripensante; butikumon planas:
nur terpomojn, "Nur terpomojn!" eĥas.

Fabrikfaritaj lignaj iloj
risorton etan enhavantoj, kie
nun la tukpinĉiloj de l' cigan' ?
Formigris ili, la ciganoj, ien.
Neniu diras, kelkaj neas,
ne 'scias', tamen oni miras pri l'
nescio, ĉar ĉiame, ĉiujare
e ili venis. Kien migras ili?

Malnovaj vestoj, nigraj, grizaj,
malsekaj kakiaĵoj pezaj, per
leĝera vento alprenitaj, lante
e ondas kaj sekiĝas freŝaere.
La puraj aĵoj sin vualas.
Novembra suno brume palas; ne
retroen vidas ŝi, nek scias, ke
sulkhaŭtulin' nebula sekvas nepre.

Ŝi sidas en la ĉambro ombra
Sulkhaŭtulin' en vesto sombra, ŝi
kutimas vidi en la korton, ĉar
plezuroj ŝiaj jam multnombras tie.

Okuloj senkolorigitaj
meditas aĵojn pendigitajn, per
pinĉiloj plastaj multkoloraj; nun
la junulino de mien' ŝajnfera
kun cigared' en buŝ' laboras;
ĉu ŝin ne vidas, ĉu ignoras? nur
malpezaj multkoloritaĵoj, el
superbazaro, vante floras plure.

La junulino nun forpaŝas.
Ombrega trairej' ŝin kaŝas; klar-
memore platigita brusto, kaj
senkarnigita vang' helasas larme;
forgesitaĵoj sin malkaŝas svarme.

Karolina Gilmore

Helasas: veas, malgajas

Tago de la Esperanta Libro

La 15a de decembro estas tago ne nur de Zamenhof, sed ankaŭ de tre praktika agado: la aĉeto kaj lego de Esperantaj libroj. Ĉu ion taŭgan vi trovos ĉi tie?

Forma virtuo

Homo, Eduardas Mieželaitis. El la litova trad. Petras Čeliaskas. Vilnius: Vaga, 1986. 94p. 20cm. Bind. Ilus. Prezo: 4,80 gld.

Eduardas Mieželaitis estas granda poeto de Litovio, kaj li kaj ni estas bonŝancaj pro tio, ke lin interpretas por ni virtuo de la tradukarto, Petras Čeliaskas. La poemoj en *Homo* fluas kaj trafas kvazaŭ originale en Esperanto verkitaj. Čeliaskas scias trovi rimojn, eĉ en multopaj serioj, kiuj falas kvazaŭ nature sur sian lokon: mi envias al li la belan paron *marn' / karn'* en "Mia korpo — korpo de la tero", kaj la konsternigante originalan *venta kanin'* en "Manoj". Tiu talento estas tiom pli grava, ĉar evidentiĝas, ke la poezio de Mieželaitis altgrade dependas de formo kaj lingva brileco, pli ol de ia originaleco de konceptoj aŭ enhavo. Tute laŭ la titolo de la volumo, Mieželaitis himnas la homon, kaj lin (ĉar ja sentiĝas ia vireco de la starpunkto) ligas rekte kun la naturo kaj la kosmo. Li prezentas ian patoson, kiu riskus fali foje en banecon, sen la teĥnika certeco de liaj rimedoj lingvaj kaj versaj. Frandantoj de tiaj virtuozaĵoj, kaj de la tradukarto entute, gustumu ekzemple la poemon "Muziko". Poste oni volos legi la ceteron de la kolekto. Kaj ne bedaŭros. Gratulon al kolego Čeliaskas, kaj al la eldonejo haviginta al ni belan kaj valoran volumon.

William Auld (Skotlando)

Enkonduko en lingvan gastronomion

Stilekzercoj (1947), Raymond Queneau. El la franca. trad. István Ertl. Pierrefitte: La Kancerkliniko, 1986. 20p. Mi-meo. 30 cm. Prezo: 6,60 gld.

Queneau (keno') Raymond, franco, bankoficisto, inventemulo, matematikisto, erudito, amiko de literoj kaj ciferoj, verkisto de poemoj kaj romanoj, (malortodoksa) superrealisto (en la dudekaj jaroj). Nask. 1903, mortis 1976. Uzis la pseŭdonomon Sally Mara. Direktoro de Enciklopedio Plejado (france: Pleiade) de 1954, kunfondis en 1960 la grupon OuLiPo. Karakterizis lin beletra alproprigo de konversa stilo, samkiel vertiĝodona vervo virtuozi vortojn. Por li lingvo estis ne nur esprimilo, sed la objekto de liaj verkoj. Li emfazis ĝian arbitron kaj ĉies rajton alimodli ĝin. Humuron de lingvaj konvencioj li esploris en "Stilekzercoj".

OuLiPo (u-li-po) Ouvroir de Littérature Potentielle (La borejo de Potenciala Literaturo). Por ulipanoj la lingvo mem, en si mem kaj per si mem, volas diri. Tiu principo

kondukis ulipanojn malal neraciismo, aŭtomata aŭ hazarda verkado, sed en absolutan region super lingvo (sen antaŭlimigoj) far diriko kaj verkiko.

Stilekzercoj Publikigita unue franclingve en 1947; parte tradukita kaj adaptita de Zlatko Tišljar al Esperantomovadaj cirkonstancoj en la libreto "Internacia Kiso" (Zagreb, 1985); eldonita kiel suplemento al "La Kancerkliniko" en 1986 (sen biografiaj indikoj). Parodio de instruaj stilekzercoj, humura malmodelo por geniaj verkistoj, ĝi konsistas el 99 diversaj versioj (ne variantoj) de ĉiam sama sensignifa anekdoto: renkontiĝo kaj ekdisputo de du viroj en buso en Parizo. Ĉiun version titolas klarigo pri la trajto, ero aŭ eco, kiu tiuversie skribe reliefas: pleonasma, animisma, onomatopeoj, istempa soneto, lipogramo, kamparana... Ĉiaj klasifikoj miksiĝas sen ia kriterio ajn. La antaŭnevidebla, kvankam dekomence sciata, simileco de intrigetoj enfermas legantojn en petolan suspenson, kiu, aldone al la disciplinoplena formhierarkia ĥaoso, efike substrekas komikon de la verko.

Ertl (lert) István, hungaro, junulo, studas la francan kaj la latinan, nuntempa ulipido. Komplete esperantigis la "Stilekzercojn" darsonvalizante la ulipeblecojn de la internacia lingvo. La maksimumo "traduko — trukado" fariĝas, kiam temas pri li, "tradukanto — truka Danto".

Georgo Kamaĉo (Hispanio)

Teksaĵo pri naturo kaj socio

Ventolume, Debora Vaarandi (1916). El la estona trad. H. Dresen, S. Kärner, J. Ojalo. Tallinn: Eesti Raamat, 1986. 142p. 16cm. Prezo: 4,20 gld.

Ĉi tie estas antologiita la kremo de Debora Vaarandi, unu el la reprezentaj poetoj en Estonio.

La komenca versaĵo refrenas per "en la urbo de Lenin", kaj ĝi simbolas la vefton de la poemaro, nome la socian engaĝitecon de la aŭtorino. Kaj nordlandaj arboj kiel betuloj, sorpujoj, juniperoj kaj aliaj, de la insulo Saaremaa, la naskiĝloko de la poeto, simbolas la varpon de la poemaro, nome la inklinon al la naturo.

La aŭtorino debutis en 1945 per versoj de socia patoso. Poste ŝiaj okuloj etendiĝis, ekzemple al *La aviadisto de Hiroŝima*, kiu faligis bombon, kaj kiun poste atakis inkubsonĝo. Dume, ŝia liriko, kiu komencis de relative simpla prikantado de la naturo, pliprofundiĝis internen. En *La ĝardeno*, ŝi alparolas urtikon: "Mi scias, ke la brulumvundoj ne estas via ĉefa kreaĵo./ Tia estas la vivo." Tiel oni povas aprezi la pensofadenojn de la sincera intelektulo sensiva.

Aprezado de literaturaĵo por mi tamen ne ĉiam estas facila, speciale ĉe poemoj kun kondensita esprimo; ne temas nur pri tiu ĉi aŭtorino, sed pri homo kun alia kultura fono. Ekzemple, *gruoj* ĉi tie estas birdoj, kiuj sciigas krimon, tial simbolas malbonaŭguron. Tio estas tute kontraŭa al la asociiĝo de pureco kaj beleco al ruoj, kiun mi, japano, havas. Komentoj librofine helpis tiurilate, kaj mi dezirus pli da ili.

La enkonduko pri la aŭtorino helpis orienti min. Cetero, estus inde havi informojn ankaŭ pri la tri tradukintoj.

Ŝibajama Ĵun' iĉi (Japanio)

Laste aperis...

Fratoj Leonkoro, La, Astrid Lindgren. El la sveda trad. Kerstin Rohdin. Högsby: la tradukinto, 1987. 128p. 21cm. Ilus. de Ilon Wikland. ISBN 91-7810-828-4. Unu el la plej lastaj verkoj de la fama infanaŭtoro, humanisma fabelo kaj samtempe streĉa rakonto. Prezo: 24,00 gld.

Graveco de la Fideligo, La, Oscar Wilde (1854-1900). El la angla trad. William Auld. Manĉestro: Esperantaj Kajeroj, 1987. 79p. 21cm. Ege sprita triakta komedio, iusence la ĉefverko de sia aŭtoro. Prezo: 13,80 gld.

Historie a spisovatelé, Josef Vondroušek. Třebíč: Esperanto-klubo de Třebíč, 1984. 44p. 17cm. Pri la Someraj Esperantaj Tendaroj en Lančov. Prezo: 4,50 gld.

Horizonto de Soveta Litovio, n-ro 10. Vilnius: Litova Filio de ASE, 1987. 68p. 28cm. Artikoloj, beletro ktp. Prezo: 3,00 gld.

Idea of a universal language, The, red. Humphrey Tonkin k. Karen Johnson-Weiner. Novjorko: CED, 1986. 128p. 28cm. Ringebind. ISBN 0-934973-05-9. Referaĵoj el la 4a CED-Konferenco, 1985 (dua tago). Prezo: 22,50 gld.

Internacia lingva komunikado. Konferencaj materialoj 6, red. Tadeusz Ejsmont. Lodzo: Studenta Scienca Esperantista Rondo, 1986. 239p. 24cm. ISBN 83-7016-205-3. Pollingvaj referaĵoj kun Esperantaj resumoj el la ĉiujaraj konferencoj (la 8a en 1986). Prezo: 21,90 gld.

Kelkaj floroj Esperantaj, serio 2, n-ro 1, A.J. Witteryck. Wilrijk: Eldonejo Sonorilo, 1987. 24p. 20cm. Ilus. ISBN 90-71652-08-4. Mucidaj ŝercoj. Prezo: 7,20 gld.

Klang der Fanfare, Der, Johano Strasser. Reinbeck bei Hamburg: Rowohlt Verlag GmbH, 1987. 44p. 21cm. Bind. ISBN 3-498-06212-3. Moderna romano pri la vivo de 20a-jarcenta esperantisto. Prezo: 55,20 gld.

Lastaj infanoj de Oldrovalo, La, Gudrun Pausewang. El la germana trad. Joachim Giessner. Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn, 1987. 77p. 21cm. ISBN 3-922570-44-5. Korsire realisma romano pri la mondo post nuklea milito. Prezo: 18,00 gld.

Leteroj de E. Lanti. Antaŭparolo de G. Waringhien. Laroque: SAT-Broŝurservo, 1987. 245p. 21cm. Movadhistorie grava represo (el 1940). Prezo: 18,60 gld.

Leksikono Esperanto-Francais-English-Nederlands-Deutsch, Jean P. Bovy. Wilrijk: Eldonejo Sonorilo, 1987 (neindikita). 105p. 21cm. Mimeo. ISBN 90-71652-10-6. Prezo: 22,20 gld.

Ludovikologiaj biografietoj, komp. Ludovikito. Kioto: Ludovikito, 1987. 335p. 22cm. Ilus. Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kromkajero 3. Zorge fotoreproduktitaj tekstoj pri kaj de la pioniroj: 25 pri Zamenhof mem, 26 pri aliaj. 37,50 gld.

Maĝango, Laurent Septier. Pierrefitte: La Kancerkliniko, 1986. 30p. 21cm. Mimeo. Ilus. Enkonduko al la fama orienta ludo. Prezo: 4,50 gld.

Mikronoveloj de Sin'iti Hosi. El la japana trad. Kikunobu Matuba. Pekino: Pekina Aviada Instituto, 1986. 124p. 19cm. Dulingva eldono (Esperanto kaj la ĉina). Prezo: 4,80 gld.

Neologisma glosaro. Eta postrikolto al PIV (2a ampleksigita eld.), Henri Vatré. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1987. 71p. 21cm. Jubilea Eldon-serio 2. Esperantologio 4. ISSN 0179-1052. Glosaro de 2000 vortoj ne registritaj en *Plena Ilustrita Vortaro*, kun fontindikoj. Prezo: 26,40 gld.

Notas e informe sobre a lingua internacional Esperanto. Santiago de Compostela: Asociacion Galega de Esperanto, 1987. 74p. 21cm. Ilus. ISBN 84-398-9049-4. Prezo: 6,00 gld.

Ondro kaj drako, Viktor Dyk (1877-1931). El la ĉeĥa trad. Josef Vondroušek. Třebíč: Esperanto-Klubo de Třebíč, 1986. 46p. 21cm. Dramo pri vilaĝanoj kiuj ne scias ĉu kredi je drakoj. Prezo: 4,50 gld.

Overcoming language barriers: The human-machine relationship, red. Humphrey Tonkin k. Karen Johnson-Weiner. Novjorko: CED, 1986. 112p. 28cm. ISBN 0-934973-04-0. Referaĵoj el la 4a CED-konferenco, 1985 (unua tago). Prezo: 22,50 gld.

Pandemonio, div. aŭtoroj. Malago: Pandemonio, 1987. 80p. 21cm. Dek ok originalaj rakontoj k.a. de ses junaj hispanaj aŭtoroj. Prezo: 15,00 gld.

Pasporta servo 1987-88. Budapeŝto: TEJO, 1987 (neindikita). 76p. 19cm. Mapoj. Kun 796 gastigantoj el 53 landoj. Prezo: 7,50 gld.

Pensoj okaze de la cent-jara jubileo de Esperanto, Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1987. 16p. 21cm. Jubilea Eldon-serio 3. Esperantologio 20. ISSN 0179-1052. Prelego ĉe la 42a kongreso de SAT-Amikaro: "oni ne pli longe lasu Esperanton al la ĝisnunaj esperantistoj." Prezo: 6,00 gld.

Plupo en la grandarbaro, Inga Borg. El la sveda trad. Malte Markheden. Motala: Progreso Eldonejo, 1987. 24p. 16cm. Kolor-ilus. ISBN 91-87320-00-2. Infanrakonto ekologia, ĉarme ilustrita. Prezo: 13,20 gld.



La tradukintoj Kerstin Rohdin kaj Joachim Giessner, respektive sveda kaj germana, kunlaboris por realigi la eldonon de du famaj humanismaj romanoj honore al la Jubilea Jaro. Ambaŭ taŭgas por pli aĝaj infanoj samkiel por plenkreskuloj.

Plupo kaj la ursidoj, Inga Borg. El la sveda trad. Malte Markheden. Motala: Progreso Eldonejo, 1987. 24p. 16cm. Kolor-ilus. ISBN 91-87320-01-0. Plia ero en la alloga Plupo-serio. Prezo: 10,50 gld.

Poemoj, Julia Pióro. Piastów: la aŭtoro, 1987. 87p. 21cm. Bind. Liberversaĵoj liriketosaj. Prezo: 21,00 gld.

Pokalo el blankdiafana porcelano, La (1954), Takeyama Mitio. El la japana trad. Zin Kiyosi. Hirosaki: Meros, 1986. 134p. 26cm. ISBN 4-87608-036-4. Romano pri inunda detruo de la urbo Ĝulu en la jaro 1109. Prezo: 20,40 gld.

Populara vortareto (dua eld.), A. Lopez Luna. Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1986. 104p. 17cm. Mimeo. ISBN 950-43-0892-9. Kaprica difinaro, precipe satira-humura. Prezo: 9,00 gld.

Pri kelkaj gravaj problemoj de l' Esperanto-movado, Stefan Maul. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1987. 30p. 21cm. 90-71205-17-7. Represo de la artikolserio "Fronte al la Jubileo" de la redaktoro de *Monato*. Prezo: 3,90 gld.


Propedeŭtiko de la klerigoscienco prospektiva, Helmar G. Frank. En la ĉinan trad. An Wenzhu. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 127p. 21cm. Ilus. Dulingva eldono (Esperanto kaj la ĉina, paralelaj tekstoj). Prezo: 24,00 gld.

Ptice i sitnice/Birdoj kaj eroj, Kosta Kuzman. El la serbokroata trad. Boriša Milićević. Novi Sad: la tradukinto, 1987. 45p. 20cm. Aforismaj poemetoj (dulingva eldono). Prezo: 6,60 gld.

Rande de l' prudento, Miroslav Krleža (1893-1981). El la kroata serba trad. Zlatko Tišljarić. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1987. 240p. 22cm. Bind. Romano en pensĉena stilo, amara, soci-fremda, de grava kroata verkisto. Prezo: 20,10 gld.

Sanga nupto kaj La domo de Bernarda Alba, Federico García Lorca (1899-1936). El la hispana trad. Miguel Fernández. Madrido: Ediciones La Misma, 1987. 229p. 21cm. Serio Oriento-Okcidento de UEA, n-ro 23. ISBN 84-86384-03-6. Du el la brilaj dramoj de la fama humanista verkisto. Prezo: 22,80 gld.

Sata vuotta kieltä toivomielellä, Allan Mehtonen. Oulu: Painotupa Ky, 1987. 82p. 21cm. Ilus. Esperanto en la finna urbo Oulu, de 1890 ĝis hodiaŭ. Prezo: 31,50 gld.



23a ero en la Serio Oriento-Okcidento fariĝis paro de dramoj de Federico García Lorca, tradukitaj de Miguel Fernández kaj eldonitaj sub la aŭspicio de Madrida Esperanto-Liceo.

Seed — a horse of hunger or a source of life? Paul Neergaard. Kopenhago: Danish Government Institute of Seed Pathology for Developing Countries, 1986. 174p. 21cm. Ilus. Special lecture series 94. Ses prelegoj, el kiuj la lasta temas pri la internacia lingvo-problemo en la sciencoj. Prezo: 12,00 gld.

Sennacieca Revuo. Paris: SAT, 1986. 56p. 22cm. N-ro 114. Diversaj artikoloj, i.a. pri la esperantistoj Pak Hunyung (Koreio) kaj V.J. Eroŝenko (Ruslando). Prezo: 13,20 gld.

Sentempa simfonio. Poem-antologio hispana, trad. Fernando de Diego. Madrid: Ediciones la Misma, 1987. 154p. 19cm. ISBN 84-86384-02-8. Sepdeko da poemoj, celanta prezenti ĝeneralan panoramon de la hispana poezio; kun mallongaj biografietoj. Prezo: 18,00 gld.

Simile al stelo en nokta ĉielo, Akira Saŭa. El la japana trad. Charles Rowe. Nova Vojo, 1987. 96p. 26cm. Bildrakonto dulingva pri la junaĝo de Zamenhof. Prezo: 33,00 gld.

Sin-konservo (1980), Intereklezia Packonsilio de Nederlando (div. aŭtoroj), trad. sub redakto de Gerrit Berveling. Vlaardingen: Voĉoj Kristanaj, 1987 (2a eld.). 52p. 21cm. Kristanaj eseoj kontraŭnukleismaj. Prezo: 6,60 gld.

Sub la signo de socia muzo, red. William Auld kaj Stefan Maul. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1987. 120p. 21cm. Ilus. de Georgo Kamaĉo. Serio "Stafeto", n-ro 2. ISBN 90-71205-16-9. Antologio de originala soci-konscia poezio kaj ses eseoj. Prezo: 24,00 gld.

Survoje al pontokulturo. Materialoj por la kosmopolita humanismo (homaranismo), div. aŭtoroj. Marburg: Info-Servo r.a. kaj Homarana Asocio, 1987. 35p. 21cm. Tri eseoj/deklaroj pri homaranismo plus rilataj materialoj. Prezo: 7,50 gld.

Teoretiĉeskie osnovij interlingvistiki, S.N. Kuznecov. Moskvo: Izdatel'stvo Universiteta Druĵbij Narodov, 1987. 207p. 21cm. Kun 200-era bibliografio. Prezo: 13,50 gld.

Transiro de ponto, Le Ŝjaŭjing. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 20p. 20cm. Ilus. Amuzaj senvortaj bildrakontoj, taŭgaj kiel instruiloj. Prezo: 2,10 gld.

Unuecaj reguloj por la kontrakto pri la internacia fervoja transporto de pasaĝeroj kaj pakaĵoj (CIV). El la germana trad. Wilhelm Barnickel. Frankfurt (neindikita): Germana Esperanta Fervojista Asocio, 1987. 43p. 21cm. Prezo: 4,50 gld.

Varmas en Romo, Corrado Tavanti. Ĝenevo: Kooperativo de Literatura Foiro, 1986. 185p. 21cm. Bombatenco atribuiĝas al terorisma organizaĵo esperantista: tiel naskiĝas ĉi tiu glata, realisma krimromano. Prezo: 34,80 gld.

Venis vespero, Fanya Bergstein. El la hebrea trad. Amri Wandel. Stanford: la tradukinto, 1987. 20p. 21cm. Ilus. de Haim Hausman. Simpla rimfabelo por la aĝoj 1 ĝis 4. Prezo: 6,00 gld.

Virino en la judismo, La (1982), M. de Goeij. El la nederlanda trad. Kolektivo de Tradukantoj Vlaardingen. Vlaardingen: Voĉoj Kristanaj, 1987. 40p. 21cm. Prezo: 6,00 gld.

Vortaj (a)ludoj, Stefan Maul. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1987. 112p. 21cm. Mimeo. Diversspecaj verketoj celantaj spriton kaj satiron. Prezo: 9,90 gld.

Zagreb. Historia prezento — gvidlibro. Zagreb: Fervojista Esperanto-Societo Zagreb, 1987. 142p. 16cm. Kolor-ilus. Mapo. Biblioteko "Etaĵ turismaj monografioj" n-ro 66. ISBN 86-7133-045-1. Prezo: 26,40 gld.

Diversaĵoj

Flageto triangula. ĈEA. 13×20. Verda kaj blanka, kun stelo kaj la vorto "Esperanto". Prezo: 6,00 gld.

Kasedo: Al Petro, W.H. Rosowsky. Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn, 1982. 60-minuta. Muziko kaj movadaj humuraĵoj. Prezo: 15,00 gld.

Kasedo: La Espero, kantas Lin Fang. Wuhan: Son-vidoa produktaĵo "Yangzi", 1986 (?). 60-minuta. Diversstilaj tradukitaj kantoj en plenumo de premiita kantistino. Prezo: 24,00 gld.

Kasedo: Gaja movado, W.H. Rosowsky. Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn, 1982. 60-minuta. Muziko kaj movadaj humuraĵoj. Prezo: 15,00 gld.

Kasedo: Kantu kun Anda. Bydgoszcz: Pola Esperanto-Asocio, Muzika Rondo, 1987. 60-minuta. Kun kantlibreto. 16 kantoj, plejparte verkitaj de Urszula Tupajka kaj kantitaj de la kvarvira ensemblo Anda. Prezo: 16,50 gld.

Kasedo: Mallongaj ondoj, W.H. Rosowsky. Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn, 1983. 60-minuta. Satiroj pri Esperantaj radioprogramoj. Prezo: 15,00 gld.

Kasedo: Miksita programo, W.H. Rosowsky. Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn, 1983. 60-minuta. Movadaj humuraĵoj de "Radio Esperantujo". Prezo: 15,00 gld.

Kasedo: La nomkarto, verkis kaj kantas La Mevo (Hirojuki Sakei kaj Takao Ono). Jokohamo: La Mevo, 1987. Esperantaj rokenrolaj kantoj. Prezo: 17,10 gld.

Kasedoteksto: Tute ne gravas, Amplifiki. Ĝenevo: Bendofako de LF-Koop, 1986. 8p. 21cm. Ilus. Prezo: 3,30 gld.

Sondisko kaj kasedo: Passport, Joëlle Rabu. Vankuvero: Goldrush Records, 1987. Kantoj en la angla, la franca kaj Esperanto de la populara artisto. Prezo: (ambaŭ formoj) 31,20 gld.

Ŝirkalendaro '88. Kunmetis kaj eldonis Nederlanda Esperanto-Junularo, 1987. 21×15cm. Unu paĝo por ĉiu semajno; enhavas krome amuzajn desegnaĵojn, rakontojn k.s. Prezo: 7,50 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezaj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 20% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Kongresa Komunikado

**73a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Roterdamo (Nederlando),
23a — 30a de julio 1988.**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando**

Loka Kongresa Komitato: Kvankam la 73a UK okazos sub plena financa respondeco de UEA kaj la ĉefajn preparlaborojn faros la Centra Oficejo, kreĝis Loka Kongresa Komitato, konsistanta el bonvolaj helpemuloj el diversaj nederlandaj lokoj. La Estraro de UEA aprobis jenan konsiston de LKK: s-ino Ans Bakker-ten Hagen (prezidanto), s-ino C. Bossong-Singer (ekskursoj), s-ro J. Calado (kongresejo), s-ino L. Demmendaal (programo), s-ro R. Ebenau (komercaj rilatoj), s-ino M. Erasmus-van Zadelhof (gazetaro), s-ro W. Pilger (artaj aranĝoj), s-ino R. Ruig-de Vries (sekretario), s-ino E. van Dijk (ĝiĉetoj). Flanke de la Centra Oficejo pri la Kongreso ĉefe okupiĝas P. Zapelli (administrado) kaj S. Milojević (kunordigo de la laboroj).

Unua Bulteno kaj Aliĝilo: Jam antaŭ la Kongreso en Varsovio aperis aparte bela plenkolora Unua Bulteno en 20 000 ekzempleroj. La prospektojn, kiuj servis por eldoni la bultenon donacis KLM, la fama nederlanda flugkompanio, kiu estas ankaŭ la Oficiala Flugkompanio de la Kongreso. La aliĝilo, kiun karakterizas revolucie malaltaj kotizoj por la landoj kun pagaj kaj transpagaj problemoj, estis distribuita kun la oktobra n-ro de la revuo *Esperanto*. Ambaŭ eldonaĵoj estas senpage havebla kontraŭ peto al la konstanta adreso de la Kongreso.

la Komisiono pri IKU, ĉe la sekretario: prof. Bruce Sherwood, Dept. of Physics, Carnegie Mellon University, Pittsburgh, PA 15213, Usono. Oni sendu fotoportreton kaj en kvar kopioj: titolon kaj resumon de la prelego, siajn koncizajn biografion kaj bibliografion, tiel ke ĉio atingu la indikitan adreson antaŭ la 15a de januaro 1988. La prelegantoj ricevos danksumon sed ne la vojaĝ- kaj restad-kostojn. Aparte estas bonvenaj proponoj de prelegoj, kiuj rilatas al la kongresa temo. Avantaĝon havas ankaŭ junaj universitataj instruistoj, kiuj ankoraŭ ne prelegis en IKU.

Programo: Estas planata abunda kaj varia arta programo, kun eblecoj de spontanea elpaŝo de novaj talentoj. Apartan atenton oni dediĉos al la edukaj kaj instruaj programoj, tiel ke la Kongreso servu por lerni ion novan kaj utilan por la movada agado. Speciala sekcio de la programo traktos la agadon de UEA kadre de ĝia 80-jara jubileo.

Loĝado: Oni jam blokis adekvatan nombron da ĉambroj en la plej proksimaj roterdamaj hoteloj, kie tranokto kun matenmanĝo kostas inter 50 kaj 100 guldenoj. Disponeblos ankaŭ malpli kosta loĝado en junulargastejo (ĉ. 25 gld) kaj en komuna loĝejo. LKK nun traktas eblecojn senpage loĝigi kelkdekon da kongresanoj, el landoj kun pagaj malfacilaĵoj, ĉe gastigemaj roterdamanoj. Kandidatoj devas esti aktivaj esperantistoj unuopuloj (do, ne geedzaj paroj aŭ tutaj familioj). Avantaĝon havos junaj kongresanoj, kiuj ankaŭ pretas helpi en laboro, ĉu ĉe siaj gastigontoj, ĉu en la Kongreso. Bonvenus rekomendoj de via loka klubo. Skribu al la konstanta adreso de la Kongreso, kaj se ni povas gastigi vin, ni respondos kiel eble plej baldaŭ.



Kongresa temo: La temo de la 73a UK estas: "Scienco kaj tekniko por internacia kompreniĝo". LKK kaj la Estraro decidis pri tiel formulita temo pro la fakto, ke oni kongresas en unu el la plej evoluintaj landoj de la mondo kaj en Roterdamo, kiu estas la plej granda monda haveno kaj iasence ekonomia kaj teknika koro de Nederlando. LKK planas grandajn abundon kaj varion de la programoj, kiuj traktos la kongresan temon: prelegoj, diskutoj, laborgrupoj, ekspozicioj, studvizitoj ktp.

Internacia Kongresa Universitato: En la kadro de la 73a UK okazos la 41a sesio de IKU. Universitataj profesoroj kaj simile kvalifikitaj personoj povas proponi prelegon al

Infana Kongreseto: Ĝi certe okazos samtempe kun la UK. Aliĝkotizo de 150 gld. inkluzivas kompletan semajnan prizorgon. Se vi havas infanojn, kiuj flue parolas Esperanton kaj aĝas inter 6 kaj 13 jaroj, petu aliĝilon ĉe la konstanta adreso.

Kotizoj: Ĝis la fino de 1987 ankoraŭ validas malaltaj kotizoj, kiuj jenas: individuaj membroj de UEA 140 (el landoj kun transpagaj malfacilaĵoj: 70), nemembroj de UEA 175 (88), kunuloj/junuloj/handikapuloj individuaj membroj de UEA 70 (35), kunuloj/junuloj/handikapuloj nemembroj de UEA 105 (52) guldenoj. Al la Kongreso jam aliĝis ĉ. 350 personoj.

● **Ĉinio:** Lin Bo kaj Wang Xigen organizis jubilean ekspozicion sur la ĉefplaco de Hefei, de la 30a de septembro ĝis la 2a de oktobro. Ĝi altiris amasan atenton ĉe la publiko (taksita kiel 5000 homoj) kaj ankaŭ ĉe la urba estraro kaj la amaskomunikiloj. Sekve, laŭ invito, la ekspozicio vojaĝas en altlernejoj kaj fabrikoj.

De la 16a ĝis la 19a de aŭgusto en Zhengzhou okazis la unua kunsido de la Ĉina Junulara Esperanto-Movado, sub aŭspicio de la Ĉina Komunisma Junulara Ligo. 95 junaj esperantistoj ĉeestis, kiel ankaŭ la urbestro de Zhengzhou, por festi la jubileon kaj diskuti la disvastigon de Esperanto inter la ĉina junularo.

● **Finnlando:** La librostoko de Fondumo Esperanto transiris al nova entrepreno, Oy Mendoservo Ak, kiu krom esperantaĵojn vendas ĉiuspecajn varojn, kutime aĉeteblajn ĉe librovendejoj, kaj podetale kaj pogrande. Ĝi kontakteblas ĉe Kivistöntie, SF-05510 Hyvinkää.


● **Hispanio:** Escepte modernaspekta informilo pri Esperanto eldoniĝis ĉe Hispana Esperanto-Federacio. *Esperanto, el idioma para comunicarse sin obstáculos* ekas per enfazo de la rajto

je komunikado kaj koncize prinotas, kun abundaj ilustraĵoj, diversajn aspektojn de la movado. Ekzempleroj haveblas de HEF, Apartado 119, E-47080 Valladolid.

Multe pli detala informlibro, kiu povus kompletigi la alian, aperis ĉe Galega Esperanto-Asocio. *Notas e informe sôbre a lingua internacional Esperanto* haveblas de la Libroservo de UEA (6,00 gld. plus sendokostoj).

● **Irano:** Ŝirin Ahmad-Nia kaj Ahmad R. Mamduhi fondis "Iranan Traduk-Centron" en Tehrano, kiu celas traduki teknikajn kaj beletrajn tekstojn el Esperanto kaj iranajn verkojn en ĝin. Jam 25 homoj anoncis si an pretecon kunlabori. Kiel komenca paŝo, s-ro Mamduhi aperigis ampleksan artikolon pri Esperanto en *Daneŝmand* ("Scienculo"), la plej prestiĝa scienca monata revuo en Irano. Kunlaboremuloj kaj interesatoj skribu al: Irana Traduk-centro, Kh. Zafar, Kh. Khojand, K. Dolatshad, K. Iraj 33, Tehran 19-166, Irano.

Kvar esperantistaj pentristoj kontribuis siajn verkojn al ekspozicio en Tehrano, kie afiŝoj kaj programo en Esperanto prezentis la bazon kaj celojn de la Internacia Lingvo.



● **Kanado:** En la malgranda urbo Nanaimo, sur Vankuvero-Insulo, eta esperantista grupo organizis oficiale proklamitan E-semajnon en julio. Per ekspozicio kaj la amaskomunikiloj ili altiris 36 homojn al postaj vesperaj kursoj.

La florbilda ekspozicio en Montrealo (*Esperanto* 1987/p.80 kaj en la foto) pruviĝis granda sukceso: alvenis pli ol 350 kartoĵoj el 32 landoj en ĉiuj kontinentoj, kaj la Botanika Ĝardeno de nun proponas Esperantan gvidilon, apud la franca kaj la angla, al siaj plurcentmiloj da vizitantoj jare.

● **Nederlando:** Fondiĝis lastatempe NEA-sekcio en la plej malcentra regiono, suda Limburgo. La Marnoland-grupo gastigis la Trilandan Renkontiĝon en septembro kaj bonvenigas kontaktojn, bibliotekaĵojn p/a Mia Martens, Karolingenstr. 5-B, NL-6224 HM Maastricht.

● **Nepalo:** Almenaŭ kvar ĵurnaloj publikigis jubilejarajn artikolojn pri Esperanto; el ili unu, Ĵanaĝagriti, aperigis plurajn verkitajn de delegito Gamvir Man Ŝresta, sub Esperantaj titoloj. En la nepala parlamento oni unuafoje menciis Esperanton, kiam delegito Parsuram Khapung starigis demandon pri solenado de la Jubileo.

● **Pollando:** Esperantistoj en Bjalistoko, la naskiĝurbo de Zamenhof, festis la Jubileon i.a. per lerneja konkurso. Lernantoj devis respondi seriojn da demandoj koncerne Zamenhof kaj Esperanton, en tri stadioj pli kaj pli malfacilaj. Konvene, la unuan lokon ĝajnis Lernejo 23 — tiu je la nomo de Zamenhof mem.

● **Sudafriko:** La 27an de julio oni intervjuis poeton kaj Akademianon Edwin de Kock en tutlanda televidprogramo, "Bonan matenon, Sudafriko", dum pli ol 15 minutoj. De Kock emfazis ne nur la praktikan sed ankaŭ la kulturen valoron de Esperanto. Kiel unu sekvo li poste intervjuiĝis ĉe tutlanda radioprogramo en tri dekminutaj elsendoj, kaj la intervjuisto Willem van Lill, entuziasmiĝinta, provos aranĝi radiokurson.

● **Togolando:** Legantoj notu, ke la adreso de la nova landa asocio estis malĝuste donita en la maja numero: temas ne pri B.P. 13369 sed B.P. 13169, Lomé.

● **Vjetnamio:** D-ro Le Phuo'ng Nam kaj la esperantista grupo de Universitato Cantho' organizis multajn Esperanto-kursojn kadre de la Jubileo, kaj por fremdlingvaj instruistoj kaj por la studentoj: entute pli ol 400 homoj. Ili ankaŭ kompilis malgrandan vortaron, lernolibron kaj ekzercmaterialon, sed bezonas multajn pliajn materialojn: librojn, revuojn ktp. Sendu aŭ skribu al: Bâ Duo'ng Thi Huê, Truô'ng Cuo Dăng Su Cấn Tho', Haŭ Giang, Vjetnamio.

Fake

● **Biciklado:** La bicikla karavano de Jorgos (*Esperanto* 1986/p.217) ja atingis Varsovion post eventoplena traeŭropa vojaĝo — almenaŭ en la senco ke Jorgos mem, sola el la originaj biciklantoj, sukcesis alveni (10 500 km). 35 homoj el 6 landoj entute partoprenis, ses dum pli ol unu monato.

● **Ekologio:** La 28an de marto fondiĝis "Mondhejmo — Ekologia Centro Internacia" laŭ la franca leĝo pri asocioj. La asocioj aĉetis 3 000 kvadratajn metrojn da tereno kune kun tri dometoj en Cauduro, 40 km okcidente de Béziers en suda Francio. Detaloj pri membriĝo en la asocio, kiu celas krei utopiecan komunumon uzantan Esperanton kiel oficialan lingvon, haveblas de Mondhejmo, 9 av. de Verdun, F-60200 Compiègne.

● **Eŭropa Movado:** Lastatempe fondiĝis Eŭropa Federacia Esperanto-Asocio, kiu celas progresigi la unuiĝon de Eŭropo kaj la uzon de Esperanto kiel dua lingvo por ĉiuj eŭropanoj. El praktikaj motivoj EFEA limiĝas je la 21 landoj de la Eŭropa Konsilio (Strasburgo). Por detaloj, membriĝo skribu al P.H. van Terwisga, Dorpsstraat 33, NL-8899 AB Vlieland, Nederlando.

● **Naturprotektado:** Igor Puškar (Ternopol) kaj Lev Medvedev (Moskvo) provas instigi internacian kunlaboron ĉirkaŭ siaj Ekologiaj Esperanto-Ekspedicioj, kiuj jam okazis kelkfoje sur la riveroj Dnestro kaj Danubo. Interesatoj pri la ekspedicioj de 1988 kaj 1989 sur Danubo skribu al Medvedev, av. Mira 196-44, SU-129128 Moskvo, Sovetunio.

● **Olimpiaj Ludoj:** Korea Esperanto-Asocio klopodas trovi ĉiujn rimedojn por apliki Esperanton al la Ludoj de 1988, kaj aparte bonvenigas materialojn el landoj, kie ili jam okazis. Sendu al CPO Kesto 4258, Seulo, Koreio. Samtempe la Esperanto-grupo en Tenerife sub gvido de Adam Goralski jam komencis agiti pri la sekvaj Ludoj, en 1992 en Barcelono. La ĉefurbo de Katalunio ja devus konscii pri lingvaj rajtoj kaj problemoj.

● **Pekina UK:** 4-hora kaj 6-hora videobendoj pri "Kvin semajnoj en Ĉinio" aĉeteblas ĉe Günther Becker, Alter Hangarten 2, D-6653 Blieskastel, FR Germanio (skribu por detaloj).

● **Ŝako:** 20 teamoj el 7 landoj partoprenis la duan Verdan Ŝakolimpikon, en Siedlce, Pollando, inter la 15a kaj 25a de julio. Hungario kaptis la unuan lokon en la vira kaj virina konkursoj, la duan Ĉeĥoslovakio, la trian Pollando.

Persone



● **Aleksiev:** En februaro la Ŝtata Konsilio de Vjetnamio aljuĝis al Nikola Aleksiev, honora prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado, la Ordenon de Amikeco. La atestilo substrekis la agadon de Aleksiev por vekti subtenon por Vjetnamio inter la esperantistoj kaj plifirmigi la rilatojn inter Vjetnamio kaj Bulgario.

● **Dessart:** UNIPAZ, la Universitato de Unuiĝintaj Nacioj por la Paco, ĵus nomumis konstantan reprezentanton en Bruselo: prof. Francios Dessart el Namur, Belgio. Prof. Dessart estas membro de AIS-Sanmarino kaj de longa esperantisto, cetere konata pro siaj laboroj rilate al la Nova Monda Komunka Ordo ĉe Unesko.

● **Tradukistoj:** En la 11-a kongreso de FIT (Federacio Internacia de Tradukistoj), okazinta en Maastricht, Nederlando, fine de aŭgusto, Esperanto reprezentis per prelego de d-ro W.A. Verloren van Themaat, aktiva tradukisto inter Esperanto kaj la nederlanda. D-ro Verloren van Themaat komentis: "Iom konsolis min pri la malbona vendado de mia traduko de *La infana raso* aŭdi, ke ĝenerale estas malfacile vekti la intereson de eldonistoj kaj la publiko por literaturaĵoj tradukitaj el malgrandaj lingvoj... Partopreni similan estontan kongreson povus profite eĉ niaj majstraj tradukistoj kiel Auld."

● **E. Lapenna:** Dum la Kongreso de Jugoslaviaj Esperantistoj en junio, s-ino Emilija Lapenna transdonis al alia sian funkcion de la ĉefdelegito de UEA. Nenio eksterordinara unuavide. Tamen, en ĉi tiu kazo temas pri ĉefdelegito, kiu servis al UEA seninterrompe de post 1953, do plenajn 35 jarojn, kio verŝajne estas rekordo de sia speco en la tuta historio de UEA. S-ino Lapenna, kiu lernis Esperanton en 1931, plenumis amasegon da taskoj je plej diversaj niveloj de la landa kaj internacia E-movado: sekretario kaj juĝkomisionano de la Belartaj Konkursoj, internacie konata recenzanto, verkisto de teatraĵoj kaj lernolibroj, redaktoro de la Esperantaj elsendoj de Radio Zagreb dum 30 jaroj (de post 1956). Ekde 1979 s-ino Lapenna estas Honora Membro de UEA.

● **Malinowski:** La pola parlamentestro kaj kongresa patrono, s-ro Roman Malinowski, daŭrigas sian meteoran movadan karieron. En oktobro, la Ĉefa Konsilantaro de PEA — kvaŭ la parlamento de la polaj esperantistoj — decidis nomumi konstantan prezidanton por pliefikigi sian laboron, kaj unuanime elektis s-ron Malinowski al tiu posteno. Roman Dobrzyński tamen restas la prezidanto de la Ĉefa Estraro, kiu havas la taskon plenumi la decidojn de la Konsilantaro. Estas aparte rimarkinde, ke Malinowski plu aktivas kiam li samtempe trovas sin centre de la ekonomiaj kaj politikaj reformoj en Pollando.

Nekrologoj

LENNART ANDERSSON, dumviva membro de UEA, mortis fine de la pasinta jaro en Smedjebacken, Svedio.

SERGEJ NIKOLAJEVIČ BOJEV, eminenta zoologo-parazitologo, mortis la 12an de junio en Alma-Ata, Sovetunio. Li lernis Esperanton junaĝe kaj daŭre aktivis pri ĝia faka aplikado.

ROMAIN CHAMBAZ (1904-1987), 40 jarojn membro de UEA, mortis ĉi-jare en Etampes, Francio, kie ĝis 1985 li estis delegito.

SIMONE COMBEBIAS, delegito en Biarritz, Francio, mortis ĉi-jare. Ŝi estis dumviva membro de UEA.

ERNEST RALPH DEARNLEY (1915-1987), kvardek jarojn fakdelegito pri korespondado kaj terkulturado en Velingtono, Novzelando, mortis ĉe la Universala Kongreso en Varsovio.

TIBERIO MORARIU (1901-1987) forpasis la 4an de julio en Stokholmo, Svedio. Post ĝia fondinto mem, li estis la plej renoma instruanto-disvastiganto de la Cseh-metodo en la instruado de Esperanto.

OLLE PERSSON (1912-1987), multjara fakdelegito en Trelleborg, Svedio kaj dumviva membro de UEA, mortis la 9an de septembro. Dum pli ol 40 jaroj li elstaris kiel loka kaj distrikta aktivulo.

TRYGVE REISAETER (1925-1987) forpasis la 21an de aŭgusto en Odda, Norvegio. Li estis delegito kaj dumviva membro de UEA kaj prezidanto de la loka Esperanto-klubo dum multaj jaroj.

PIETER JAN WILHELMUS SCHILPEROORD (1911-1987) mortis la 27an de julio en Londono, du tagojn post sia 76a naskiĝtago. Esperantisto de pli ol kvindek jaroj, li elstaris pro sia aktiveco en la propagando de Esperanto per modernaj aŭdvidaj rimedoj. Li estris la reklaman flankon de la 56a Universala Kongreso en

Londono, 1971, kaj i.a. produktis la popularan sonbendon *Londono en sono*. Kadre de la t.n. Grupo 5: Esperanto ĉe Radio kaj Televido, kiun li kunfondis en 1972, li realigis la kasedokurson *Jen nia mondo* (1974 kaj 1979). La kurso dissendiĝis ĉe la radioj de Britio, Aŭstralio kaj Usono, kaj krome aperis en la itala, islanda, sveda kaj finna. En 1974 Schilperoord produktis sondiskon de la deklamado de la fama rusa aktoro kaj esperantisto Nikolaj Rytjkov (1913-1973). Lia lasta projekto estis la kasedo kaj libro *Liza kaj Paŭlo*, kiun li ege deziris diskonigi ĉe la Universala Kongreso en Varsovio.

EVA STOP-BOWITZ forpasis 76-jara en Oslo, Norvegio, la 17an de julio. Esperantisto de 1931 kaj profesia desegnisto, ŝi i.a. faris la ilustraĵojn de Plena Ilustrita Vortaro, kaj membris en la Ekzamena Komisiono de Norvega Esperanto-Ligo pli ol 40 jarojn.

Anoncetoj

Tarifo: Ĉiu vorto kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la aperigo de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj bv. vidi la kolofonon.

Aŭstralia-Pacifika Kongreso okazos en Brisbano, 11-20 septembro 1988. Informoj: Pk. 313, Sunnybank, 4109 Aŭstralio.

"Survoje al pontokulturo": Materialoj pri la kosmopolita humanismo (homaranismo). Enhavo: *Homaranismo hodiaŭ*, *Marburga Manifesto*, *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj* (Unuiĝintaj Nacioj), *Deklaracio pri homaranismo* (Zamenhof), *Preĝo sub la verda standardo* (Zamenhof). Jen la minimumo, kiun ĉiu esperantisto devus scii pri la hodiaŭa homaranismo! Vi ricevos la verkon kontraŭ 4 int. respondkuponoj, de: Homarana Asocio, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

SAITO EIZO (1901-1987), longtempa redaktoro kaj eldoninto de *L'Omni-buso*, mortis la 8an de oktobro en Kyôto. Li eldonis kelkajn gravajn librojn, inklude de *La danĝera lingvo* (Lins), *Historieto de la japana Esperanto-movado* (Miyamoto) kaj *Mi amas...* (Ueyama).

CHRIS R. WARNKEN (1912-1987), fakdelegito pri rozkrucismo, forpasis la 7an de julio en San José, Usono.

GERTRUD WEIGELT (1911-1987), dumviva membro de UEA, mortis antaŭ kelkaj monatoj en Spiegel, Svislando. De 1956 ŝi estis berna fakdelegito pri bibliotekoj kaj vegetarismo.

FERNANDO ZACCHÉ, pli ol 30 jarojn membro de UEA, vicdelegito kaj fakdelegito pri industrio kaj komerco, mortis ĉi-jare en Mantova, Italio.

ZIN KIYOSI, i.a. tradukinto de la romano *La pokalo el blankdiafana porcelano* de Takejama Mitio, mortis la 6an de novembro 1986 en Amori-si, Japanio.

Ĉiuj leteroj senditaj al la svazilanda delegito ricevos atenton. Bv. pardoni la longan malfruon kaŭzitan de severa kormalsano de la delegito. Post la resaniĝo ne nur la urĝaj aferoj sed ĉiuj leteroj estos responditaj. Ĉiuj, kiuj skribis al li, sciu, ke iliaj leteroj helpis la sorton de Esperanto en Svazilando kiel "dokumentoj", eĉ se ili ankoraŭ ne estas responditaj. Bv. ne konsideri vian tempon kiel perditan, ĉar la nobla afero de Esperanto gajnis, kaj en la fino ankaŭ via deziro plenumiĝos. P. Dlamini, sekretario.

Juna bulgara fervojisto, kolektanto de pri-Esperantaj poŝt- kaj glumarkoj, dez. kor. tutmonde: Valentin Georgiev, str. Rabotniĉeska klasa 91, BG-1324 Sofia, Bulgario.

Alĝeria komencanto, 23-jara sekretario serĉas korespondantojn: F-ino Fatika Menouer, Ecole Hamiti Charef, Benabdelmalek Ramdane, 27320 DZ Mostaganem, Alĝerio.

ESPERO POR SENESPERA MONDO:

Jen tre grava kaj urĝa mesaĝo pri la konfuzita mondo. Skribu por senpaga libreto al: **INTERNACIA BIBLIO-MISIO**, 29 Plantation Road, Poole, BH17 7LN, Britujo.



Korespondanta
Servo
Mondskala
de UEA

Petu la novan informilon de: KSM, p/a R. Llorens, 121 bis, BD. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

Marjorie Boulton

FAKTOJ kaj FANTAZIOJ

La nun jama fama legolibro por progresantoj, speciale komisiita de UEA, kun 52 variaj ĉapitroj, plenaj de fabeloj, mirindaĵoj kaj rakontoj pri homaj atingoj kaj kuriozaĵoj el la tuta mondo.

"Ĉi tiu riĉ-enhava kaj lingve bonega libro estas skribita en stilo, kiun oni sen pli povas nomi modela. Kvankam la aŭtorino klopodas por ke la libro estu gradigita de tre facila al malpli simpla, ni nenie trovas stilon infanan, nematuran kaj tedan, kiel ofte en lerniloj. Ĉi tie ni renkontas Esperanton en ĝia pura formo, klara senartifika kaj ofte tre originala."

H.A. de Hoog (*Dia regno*, n-ro 1/1985)

Eldonis Universala Esperanto-Asocio, 1984. 432p. Ilustrita de Alex Brychta. 21cm. ISBN 92 9017 028 X. Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 36,00 gld. (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).

Abonu

EL POPOLA ĈINIO

Nun komenciĝas la abonvarba kampanjo de *El Popola Ĉinio* por 1988. Tiuj, kiuj abonas aŭ reabonas nian gazeton en la kampanjo (de 1 okt. 1987 ĝis 28 feb. 1988), ricevos unu artefaritan rubildon. La abonvarbantoj ricevos ĉinstilajn memoraĵojn laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando, rekte al Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (Guoji Shudian), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio, aŭ al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. **Bv. noti**, ke UEA peras nur laŭ la nederlanda tarifo.

ABONTARIFO DE EL POPOLA ĈINIO en lokaj valutoj (ekvalida de 1 okt. 1987):

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15,00	25,00	35,00
Aŭstrio	AUS	200,00	340,00	480,00
Belgio	BEF	550,00	930,00	1300,00
Britio	GBP	8,00	13,60	19,00
Finnlando	SFK	64,00	108,00	150,00
Francio	FRF	90,00	150,00	210,00
FR Germanio	DEM	30,00	50,00	70,00
Hispanio	ESP	1200,00	2000,00	29,00
Italio	ITL	18000,00	30600,00	43000,00
Japanio	JPY	3000,00	5400,00	7500,00
Jugoslavio	YUD	1500,00	3000,00	4300,00
Kanado	CAD	14,00	23,00	33,00
Nederlando*	NLG	34,00	58,00	82,00
Nov-Zelando	NZD	20,00	34,00	48,00
Portugalio	PTE	1100,00	1800,00	2600,00
Svislando	CHF	25,00	42,00	60,00
Usono	USD	12,00	20,00	28,00

* Nederlandaj klientoj bv. aldoni 5 % por la enlanda imposto.

Por aliaj landoj en Eŭropo:

GBP	8,00	13,60	19,00
USD	10,00	17,00	24,00

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

GBP	5,00	8,50	12,00
USD	6,50	11,00	16,00

**La varbilon kaj senpagan specimenon
Guoji Shudian sendas laŭ peto.**

STUDOJ PRI LA INTERNACIA LINGVO Etudes sur la langue internationale Studies on international Language

Gent
AIMAV
1987

Michel Duc Goninaz (ed.)

Université de Provence à
Aix-en-Provence
En collaboration avec
la Universala Esperanto-Asocio

J. Leyk, La Esperanta socio fronte al la ekstera medio; U. Lins, Marxismus und internationale Sprache; D.L. Gold, N.Z. Maimon's La kaŝita vivo de Zamenhof; R.E. Wood, The Development of Standard Phonology in Esperanto; P. Janton, Latentaj strukturaj trajtoj de la Esperanta gramatiko; R. Rokicki, Leksemstrukturaj aspektoj klasifiki la Esperantan morfemaron; I. Szerdahelyi, Principoj de Esperanta etimologio; M. Duc Goninaz, Problemes sémantiques et sociolinguistiques dans l'usage de l'espéranto; C. Piron, Créativité et expression linguistique.

Mendu de la Libroservo de UEA: 39,00 gld. plus sendokostoj, 1/3-rabato por minimume 3 ekz.

Piaf kantas en Esperanto!

Ŝi furoris en Pekino kaj ravis en Varsovio. Nun vi povas ĝui la artimon de Joëlle Rabu sur 60-minuta sondisko aŭ kasedo. "Passport" inkluzivas kantojn en la angla, franca kaj Esperanto, kun plenaj tekstoj.

Passport
Joëlle Rabu

Ankoraŭ haveblas (6"-disko):

Omaĝo al Veselin Damjanov

Mendu de la Libroservo de UEA. Passport (kasedo aŭ disko): 31,20 gld.; Omaĝo: 6,00 gld. 1/6-a rabato por minimume 3 ekz.

el la seminario organizita de UEA ĉe Unesko (1985):

PLURILINGUISME ET COMMUNICATION

red. F. Lo Jacomo

Studadon de komunikado oni ne limigu al studado de teknologiaj iloj por diskonigi informojn: jen la ĉeftemo de la 24 aŭtoroj de ĉi tiu verko. kies tekstoj prilumas unuflanke la riĉan kontribuon de lingva diverseco al la homa heredaĵo, aliflanke la gravecon kaj aktualecon de la tiufontaj komunikaj problemoj. 80% franclingva, 20% anglalingva.

Plurlinguisme et communication, red. F. Lo Jacomo. Paris: SELAF, 1986. 330p. 24cm. ISBN 2 85297 194 1. Prezo: 57,00 gld.

Fokuso

Kvaronjara
popularscienca
magazino

64 paĝoj, 22 × 15,5 cm
Jarabono ĉe UEA 24 gld.

SENPAGA PROVEKZEMPLERO:
HEA-FOKUSO, Pf. 193, H-1368
Budapest, Hungario

KOREAJ ESEOJ

NOVELOJ KAJ POPOLRAKONTOJ

1932-1967

TRADUKIS HAJPIN LI

222p. 15x22cm. Mendu ĉe
la Libroservo de UEA:
12,90 gld. plus sendokostoj.

la amiko, kiu helpas in-
struistojn transformi ko-
mencantojn en parolantojn

Juna amiko


4 numeroj jare, 8,40 gld ĉe
UEA au nacivalute ĉe multaj
perantoj. Petu specimenon de
HEA, pf 193, H-1368 Budapest,
Hungario



La amiko,
kiu paroligas



Desegnaĵoj: Pavel Rak



Jubileaj Filatelaĵoj

9 landoj emisiis poŝtaĵojn honore al la Centjara Jubileo de Esperanto. Ne malhavu ĉi tiun unikan kolekton! Mendu de la Libroservo de UEA (aldonu 10% por sendokostoj; triona rabato por tri aŭ pli da ekzempleroj de ĉiu unuopa filatelaĵo).

Laŭhorloĝe:

		gld.
GDR:	poŝtmarka bloko	4,50
Bulgario:	poŝtmarko	3,00
	maksimumkarto	4,50
Surinamo:	poŝtmarkserio	7,80
	unuataga koverto	10,50
Ĉinio:	poŝtmarko	3,00
	unuataga koverto	4,50
Pollando:	poŝtmarko	3,00
	unuataga koverto	4,50
Kubo:	poŝtmarko	3,00
	unuataga koverto	4,50
Malto:	poŝtmarko	3,00
	unuataga koverto	4,50
Sovetunio:	koverto	3,00
Koreio:	poŝtkarto	1,80

